

72<sup>(90)</sup>



Dumonata kultura informilo k esprimilo esp-ista

Unu numero : 6 FF. Abono por 1987 kun adresaro : 30 FF.

Ĝiri al la p&e-k-numero : 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut

\*\*\*\*\*

### ENHAVO

- \* Unu rideto (anonima). Kriminala felietono ... 2
- \* Nia debato : TERORISMO, ĈU MILITO ? (Valo, J.C.Picquet, Ĵanseb, Oksana, Nicole Déjean, J.G., Jean-Claude, Suzanne, Ĵakelino) 3/17
- \* La lingvistika miopeco de l'greka-armena filozofo Georgo Gorgiado (Ergoto de Bonaero) ... 17
- \* Vortoj de maljunulo (Valo) ... 19
- \* Miaj unuaj paŝoj en lernejon (Koffi Gbeglo) ... 23
- \* Meditekskurso en la brila lando (Michèle Freud) ... 25
- \* Sin diri (Nikolin') ... 28
- \* Paĝo de Krishnamurti ... 30
- \* Konvena fianĉino (A.Visoĉenko) ... 31
- \* Memore (Valo) ... 36
- \* Poemoj (Pako la tria, Lina Trenner Gabrielli) ... 37
- \* Proporcioj (Valo) ... 38
- \* Mortulkantado (B.Traven) ... 38
- \* Fabelo por niaj infanoj : La lignoĉevalo (H.H.) ... 43
- \* Por niaj infanoj (Al la gepatroj) (Gastono) ... 47
- \* Pripensoj pri "amo"... (Vera Sinort) ... 50
- \* Ĉies voĉo : Suzanne, A.Lopez Luna, Oksana, J.Manceau, Deker, S.Suk) 51/58
- \* Laŭtaj informoj : (Paradizo tuj, Perigorda E-Grupo, Mondhejmo, SAT-JF, Radio Vatikana, SAT-BS, kc.) 59/67
- \* Krucvortoj (Sfinksido) ... 68

## UNU RIDETO

Unu rideto kostas nenion kaj produktas multe  
Ĝi riĉigas tiujn kiuj ĝin ricevas  
Sen mizerigi tiujn kiuj donas ĝin.  
Ĝi daŭras nur momenton  
Sed ĝia memoro kelkfoje estas eterna.  
Neniu estas sufiĉe riĉa por ne ĝin deziri  
Neniu estas sufiĉe malriĉa por ne meriti ĝin.  
Ĝi kreas la feliĉon ĉe la hejmo, subtenas la komercon,  
Ĝi estas la videbla signo de l'amikeco.  
Unu rideto donas ripozon al la laca estulo,  
Redonas kuraĝon al la plej senkuraĝigitaj.  
Oni ne povas aĉeti ĝin, nek prunti, nek ŝteli  
Ĉar ĝi valoras  
Nur de la momento kiam ĝi estas donata.  
Kaj se, hazarde, vi renkontas personon  
Kiu ne plu scias montri rideton,  
Estu malavara, donu al ĝi la vian  
Ĉar neniu pli bezonas rideton  
Ol tiu kiu ne povas doni unu al la aliaj.

ANONIMA

(Tradukis Renato G.)

\*\*\*\*\*

### Nia kriminala felietono

Eric Hébert, kiel anarkisto, rifuzas servi la ŝtaton, eĉ per civila servo. Tial, la 5an de februaro 1986a, li ne iris al la kazerno de Douai por tie komenci soldatservon. La 2an de oktobro 1986a, la franca justico komencis lin serĉi. La 9an de aprilo 1987a, ĝendarmoj lin arestis ĉe la elirejo de lia laborejo. Kondukite antaŭ iun oficiron, Eric rifuzis obei lian ordonon surmeti uniformon. Tial li estas nun mallibera kaj atendas sian proceson.

adreso de Eric Hébert

n° 27372 459 A

F 59374 LOOS LES LILLE

adreso de lia subtenkomitato

B.P. 58

F 76160 DARNETAL

\*\*\*\*\*

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto" organizas internacian ekspozicion pri la agado por sana vivmaniero, kontraŭ alkoholo kaj fumado en diversaj landoj. Tiucele ni kolektas ĉiulingvajn tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esperanto, en la angla, rusa, uzbeka kaj laŭbezzone ankaŭ en aliaj lingvoj. Bonvolu sendi ĉion (plejeble baldaŭ) al : International Friendship Club "Esperanto", P.O.Box 76, 703000 Samarkand, Uzbekistan USSR.



## TERORISMO : ĈU MILITO ?

Enkonduko de VALO :

Pri teroristaj krimoj mi legis kaj aŭdis : "Tio estas milito, kiun oni faras al ni." Sed sur televida ekrano mi vidis fortikan viron en pseŭdoparaŝutista vesto, kiu post terorista krimo komentis : "Tio ne estas milito, tio estas murdo". Mi komprenis : murdo estas fia ago, severege puninda, sed milito estas io glora, laŭdinda, admirinda ; militisto venkinta aŭ mortinta sur la batalkampoj ricevas ordenojn. Li ne estas murdisto : li ja amasbuĉas homojn, sed nur "malamikojn". Inkluzive virinojn kaj infanojn.

Iam sur la urba bazaro mi vidis pendantan kadavron de kapreolo. Pasanto kun fremda paroltono (mi poste eksciis, ke li estas hungaro) rigardis, kaj diris al mi : "Sed ĝi estas ino! Sinjoro, en mia lando oni ne mortigas inojn." Tio estas bona moro de ekologie konsciaj ĉasistoj, kiuj protektas la bestajn speciojn. Sed pri la homa (kiu ja pli ol sufiĉe plimultiĝas) oni ne bezonas tiajn prizorgojn. En kelkaj landoj estas nun soldatinoj batalantaj per armiloj, kaj en ĉiuj landoj, en okazo de milito, la virinoj kiel la viroj sendistinge estas viktimoj de la bombardadoj. Jen estas progreso en la egaligado de la seksoj.

Ankaŭ en teroristaj atencoj estas egale trafataj virinoj kiel viroj, kaj infanoj kiel plenkreskuloj. Jen estas ja similo inter terorismo kaj milito.

Alia similo : la teroristoj estas ĉu fremduloj, ĉu almenaŭ dungitoj de iu fremda potenco (en la opinio de la naciistoj, kiuj trovas en tio pravigon al sia natura ksenofobio). Por iuj el miaj samnacionoj, ĉiu arabtipa homo facile fariĝas suspekta. Se mi estus brunhaŭta kun nigraj krispaj haroj, mi ne ĉiam sentus min trankvila en mia lando. Dum la unua mondmilito oni vidis ĉie spionojn, dum la dua membrojn de la kvina kolono. Nun iuj vidas ĉie teroristojn : ĉu do ni estas jam en la tria mondmilito ?

**Jean-Christophe PICQUET : Post la kapreolo, ĉu la kokidoj havas dentojn ?**

*Oni kutime diradas, ke la 20a jarcento estas la jarcento de nacionalismo. Fakte multaj popoloj bataladis - kaj plu*

batalas - por ekhavi reg-rajton sur iu regiono, aŭ eta parto de pli granda lando...

Alia fakto estas, ke la esperoj de iu aŭ alia minoritato asimiliĝas kelkfoje kun projektoj de pli granda lando. Do tiu grand'frato helpas kaj subtenas per mono kaj poste per armiloj tiun popolon kaj tuj ŝmirante la helpon per koloro ideologia - esperas pligrandigi sian potencon kaj influon en tiu parto de la mondo.

Do, de tiuj faktoj - kaj de aliaj - kion oni povas konkludi ?

Unue oni devas esti nepretendema en la konkludoj, ĉar ĉiuj situacioj havas sian propran historion kaj esperi trovi komunecon inter malsamaj situacioj estas ege malfacile.

Due - tamen la originaleco de nuntempa situacio estas, ke tiuj movadoj batalas por sin apartigi de alia pli granda grupo, esperante havi nacian potencon sed estante pli malgranda ol antaŭe. Alimaniere dirite : centripetaj fortecoj estas pli aktivaj ol centrifugaj..

Trie - sed la 19a jarcento estis ankaŭ jarcento de nacionalismo. Kia diferenco inter la du ? La centrifugeco estis tiam pli potenca. Oni ne sukcesis detrui grandajn imperiojn. Kial ? Eble oni povas riski ideon : la nuntempaj konfliktoj situas sur internacia nivelo (Arafat parolis ĉe U.N.O. kaj eble la "palestina problemo" solviĝos iam per akordiĝo de Usono kaj Sovetio).

En tiu tempo (19a jarcento) ne, ĉar la ekonomio ne disvolviĝis sur internacia nivelo. La 20a jarcento inventis mondan merkaton kaj ĉio devas trovi sian lokon rilate al ĝi.

Alia aspekto de terorismo estas tiu, en okcidenta Eŭropo, ligita al kelkaj pseŭdopolitikaj etaj movadoj (en Francio, en Germanio aŭ Italio...). Tiu ne situas sur etnisma tereno sed sur tiu de politiko kaj esperas, montrante la batalantan vojon, ke "laboristoj" eniros tiun vojon por faliĝi la ŝtaton. Ĝi kontribuas al spektaklo de la ŝtato. Plaĉas al bon-animoj la gluitaj portretoj de fikrimuloj. La policistoj en la stratoj estas uzataj por montri, ke la "interna malamiko" ĉiam ekzistas. Silentu !

Estas bone konate, ke la milito estas daŭrigo de la politiko per aliaj metodoj, rilate al komuna ideo : venki malamikon. La sola espero mia estas, ke en la estonteco oni sciu miksi la respekton de etnismaj minoritatoj en disvolviĝo de politikaj respondecoj, sed sen endanĝerigi ekonomikajn potencialojn.

**Ĵanseb : TERORISMO**

Murdo aŭ milito ? Ĉu tio gravas ? Se jes, kial ? Milito estas legitima murdo. Oni tiam murdas pro "bona" afero. Oni uzas perforton por esti rekonita kiel aparta popolo, ne parto de

alia. Ĉiuj sendependaj nacioj konkeris sian sendependecon uzante perforton. Sed la samaj nacioj ne ŝatas, ke ero de si petas sendependecon, precipe perforte.

La teroristoj volas, ke oni konsideru ilin kiel militistojn, ĉar tio legitimas ilian aferon. Ili oficiale ne agas por iu lando, do malfacilas rebati ilin. Ili estas tamen helpataj de landoj, kiuj donas al ili armilojn kaj ŝirmon. Ankaŭ tiuj landoj estas netuŝeblaj, ĉar ili estas protektataj de iu superpova lando. Tiu tuj rebatus, se oni ĵetus atombombon sur la helpan landon.

La teroristoj ŝatas malklarajn situaciojn. La okcidentanoj estas logikaj, raciaj. Ili bezonas klare kompreni la situacion por racie agi. En mala okazo, ili hezitas, perdas tempon kaj malefike agadas. Iliaj malamikoj scias tion kaj provas profiti de tiu malforteco. La unua afero, kiu estas klara, estas ke ili faras ĉion por malklarigi la situacion.

Tamen restas problemo : Kial iuj iĝas teroristoj ? Eble, ĉar ili kredas je sia afero. Sed ankaŭ ĉar ili havas ĉirkaŭ si mizerajn homojn, kiuj ne plu havas ion perdeblan. Tiuj volas vivi, konstrui, eduki siajn infanojn, sed ne havas rimedojn por tio. Aliflanke, en super-disvolvigitaj landoj, homoj havas ĉiajn facilajojn, sed neniun atingindan celon. Ili kreas al si falsajn problemojn, por okupi sian vivon. (Vidu la filmon : "Le déclin de l'empire américain", kiu belege ilustras la temon.)

Kion oni povas esperi por la jaro 2000 ? Pli bonan komprenadon de la homoj, pli taŭgan dispartigon de la riĉaĵojn ? La estonteco respondos al tiu demando.

### **Oksana : PRI CELOJ KAJ RIMEDOJ**

La 20-a jarcento estas, sendube, specifa jarcento. Sed la starigita demando estas antikva kiel la mondo mem :

Ĉu la Celo pravigas rimedojn ?

Ĉi-rilate, jen mia firma konvinko : neniu celo, kiom ajn justa ĝi estu, pravigas barbarajn metodojn. Cetere, mi naskiĝis kaj loĝis en lando, kie ĉi tiu kruela logiko (celo pravigas rimedojn) atingis sian apogeon, t.e. mi loĝis en Sovetio. Komence, en la Rusia Imperio, celo de revoluciuloj estis kupto de povo, por poste feliĉigi popolon. La bolŝevikoj kaptis povon perforte en oktobro de la 1917-a jaro, do baldaŭ oni festos 70-jaran jubileon. La celo de t.n. "armita insurekcio kontraŭ la Provizora Registaro" estis nobleza : "Pacon, al popoloj!", "Teron, al kamparanoj!", "Fabrikojn kaj uzinojn, al laboristoj!". Reale : milito finiĝis nur surpapere. Pro bolŝevika puĉo ekflamis longega sanga civila milito, forportinta milojn da viktimoj de ĉiuj flankoj. Pro

la belega slogano "Teron, al kamparanoj!" miloj da kamparanoj fordonis siajn vivojn... Por kio ? Por ke en la 30-aj jaroj tiu tero al ili donita kaj per ilia sango superversita, estu de ili forprenita. Milionoj (mi ne eraras) da kamparanoj mortis pro artefarita, desupre planita, malsato en la 1933-a jaro. Do, ĉio okazis sensange, sed tre efike. Vidu : eblas ankaŭ tiel - nek milito, nek terorismo - milionoj da viktimoj. Kiucele ? - Por "feliĉo de popolo" ! Ĉar la celo estis ja noblega : Oni konstruis Novan socion, edukis Novan homon, forĝis Novan psikologion (kaj kiel estas konate, kamparanoj pro siaj "privatemaj instinktoj" bremsis la gloran marŝon al pintoj de Komunismo). Finfine, oficiale, oni tute ne murdis homojn ; oni "likvidis kulakojn" kaj subkulakojn\*\* kiel klason".

- La 20-a jarcento estas jarcento de senprecedentaj genocidoj:
- ĉu pro socia deveno (Sovetio kaj sovetiismaj landoj)
  - ĉu pro nacia (rasa) aparteno (nazioj kaj stalinistoj - ekzemple "nigra listo de 6 deportendaj nacioj"\*\*\* de Stalin)
  - ĉu pro "moralaj konsideroj" (nazioj - ekstermo de samseksemuloj)
  - ĉu pro religia maltoleremo (ekz. nuna irana integrismo)
  - ĉu pro ateista maltoleremo (Sovetio kaj kelkaj sovetiismaj landoj)

Mi donis nur ekzemplojn kaj ne pretendas je sintezo. En ĉiu kazo grupo de homoj pro tiu aŭ alia kialo estis eligita el homa komunumo kaj destinita por likvido pro decidoj de respektivaj Superaj Aŭtoritatoj, gvidataj de siaj Superaj Ideologioj.

Terorismo de "Rekta Agado", okcidentgermana "Frakcio de Ruĝa Armeo", belgia "Ĉeloj de komunistaj kunbatalantoj" nutras sin per malnova frazeologio de "klasbatalo", kiu ne vidas homon, sed nur "klasamikon" aŭ "klasmalamikon". Kaj, laŭ ilia logiko, ĉiuj "klasmalamikoj" devas pereji pro noblaj celoj de "laboristaro" (tiun laboristaron la supre cititaj teroristoj neniam demandas, kaj tiun laboristaron ili ankaŭ profunde malestimas, kaj, mi certas, akirinte povon, ili ekstermus sian propran popolon pli kruele ol iu ajn tirano). Terorismo estas elprovita

\* kulako : riĉa kamparano.

\*\* subkulako : mezriĉa kamparano.

\*\*\* 6 deportitaj nacioj : krimeaj tataroj, ĉeĉenoj, inguŝoj, karaĉaĵoj, balkaroj, kalmukoj. Aldone : Volgaj germanoj. Kune : 1 miliono da homoj.

metodo de ĉiuj "klasbatalantoj". Sufiĉas nur menciigi, ke ĉiuj pli-malpli danĝeraj oponentoj (aŭ rivaloj) de stalinisma diktaturo estis korpe likviditaj (ĉu ene de la lando, kiel ekz. murdo de Kirov en Leningrado (1934), ĉu eksterlande - murdoj de Trockiĵ, S. Petljura, E. Konovalec kaj multaj-multaj aliaj).

Pri Vaska terorismo (ETA). Mi agnoskas rajtojn de la vaska popolo je propra ŝtato, sed neniam mi aprobus kruelaĵojn de ETA. Eĉ mi dirus : neniukaze mi dezirus venkon de ETA, ja ilin gvidas nur falsa frazeologio pri "popolo", reale ili iĝus teruraj despotoj kaj ripetus stalinismon en Vaskio.

Pri palestinanoj. La "palestina problemo" certe ekzistas. Cetere, kiom da nacioj, tiom da problemoj. Tamen, ne ĉiuj metas bombojn, por ke oni parolu pri ili. Terorismo estas ekstremaĵo de potenc-avido de certa homgrupo, politiko de timigado kaj ĉantaĝo. La sola sinteno, ebla dum similaj cirkonstancoj, estas necedemo al iliaj postuloj.

Resume : en nuna Okcidento, terorismo havas diversajn kolorojn :

- t.n. "hejma" : ruĝa (komunista) aŭ "nigra" (ekstremdekstra), unuigitaj per sama celo : kapti povon por poste "feliĉigi la popolon" (eĉ se malgraŭ ĝia volo, tio por ili ne gravas!)
- internacia : multkolora.

Demokratio estas skuata inter ĉi tiuj ekstremaj tendencoj kaj estas nia tasko esti atentemaj kaj ne permesi glitadon de demokratio al abismoj de ekstremistoj, kio kondukus la demokratiajn landojn al totalismo (ĉu dekstra, ĉu maldekstra, ambaŭ same teruraj). Demokratio ne estas io definitiva, nerenversebla, unufoje por ĉiam akirita. Bedaŭrinde, kelkfoje, legante kritikojn (ofte tre ĝustajn) pri nuna Francio, mi havas impreson, ke la aŭtoroj ne komprenas ĉi tiun simplan veron : por Demokratio oni devas batali ĉiutage, de ni ĉiuj dependas ĝia sorto. Elprovo de Demokratio ne estas facila. Kiom da el ni povus subskribi sub ĉi tiuj vortoj : "Mi malamas viajn ideojn. Sed mi pretas morti por tio, ke vi ĉiam havu eblecojn eldiri ilin". Laŭ mi, en ĉi tiuj vortoj, kvintesenco de demokrata mondpercepto kaj demokrata konduto. Terorismo eltiras avantaĝojn por sia agado ĝuste en la demokrataj landoj. Sed danĝero de terorismo ne devas modifi la demokratian ordon (malgraŭ kaŝitaj esperoj de certaj civitanoj kaj grupigoj). Mi ne kredas, ke terorismo (ĉu dekstra ĉu maldekstra) sukcesos renversi demokration. Ja ĝia forto (tiu de demokratio) estas en apogo de miliono, dum tiu de teroristoj aŭ aspirantoj pri totalismo en centoj aŭ dekoj. En ĉi tiu nekontestebla fakto troviĝas miaj esperoj. Kaj kiam mi indignas pro supera hipokriteco de francaj

komunistoj aŭ pro krudaj eldiroj de novbakitaj batalantoj por "pureco de la franca nacio", mi tamen rememoras : "Mi malamas viajn ideojn. Sed..." Oni ne naskiĝas demokratoj, tiaj oni iĝas. Kaj tia, laŭ mi, estas la sola vojo de homaro.

#### **Pretere : pri rasismo** (al Valo)

Plene harmonia kunvivado de diversnaciaj kaj diversrasaj homoj ekzistas nenie. Tamen oni ne minimumigu la atingitan progreson, interalie, en Francio. Laŭ mi, Francio estas ĉi-rilate admirinda lando. Se interesas vin mia sperto, mi dirus al vi kompare : en Sovetio floradas ne nur senbrida grandrusa ŝovinismo, sed ankaŭ rasismo. Kiom da fojoj mi aŭdis nomi niajn mezaziajn loĝantojn "mallarĝokululojn" kaj nigrulojn "nigrapugulojn" k.s. Oni ĝis nun montras perfingre preterirantan nigrulon, turnas sin malantaŭe por pli bone vidi, knabinoj kun abomena grimaco forkuras se iu nigrulo proksimiĝas al ili ktp. ktp. Estas multegaj ekzemploj. Sed nenial al iu venis ideo paroli pri rasismo en Sovetio (krom disidentoj, certe. Sed ili ja ricevadas monon el Usono por "kalumniado"! ). Rasismo ekzistas en Francio - ho jes, tion la sovetiaj ĵurnalistoj ne preterpasos menci, sed pri sia propra lando, eĉ ne vorteton! Ja tie ĉio brilas.

**Aldone pri militoj.** La nuna oficiala sovetia doktrino daŭre flegadas tezon pri "justaj" kaj "maljustaj" militoj. Laŭ ĉi tiu doktrino, nuna milito en Afganio estas "justa", ĉar... por "bonfarto de popolo" ! Ke tiu popolo jam perdis milionon da siaj gefiloj kaj aliaj milionoj estas en ekzilo, tio la ideologojn de "justa" milito ne interesas. Ĉar la Celo estas tiom granda, tiom bela, tiom luma ! Kaj - cetere - oni ja ne murdas afganojn, sed nur "banditojn". Kaj pereintaj sovetiaj soldatoj, plenuminte sian "internacian devon", akiras Senmortecon (se vi ne kredas, legu la sovetiajn ĵurnalojn...) Nu, ili ne iras rekte en Paradizon (kiel iranaj soldatoj), ja Paradizo ne ekzistas, laŭ sovetia ateisma doktrino, sed Senmortecon ili akiras. Valoras morti, ĉu ne ?

P.S. Konsciante, ke ne ĉiuj el ĉenero posedas la rusan lingvon, mi konsilas aĉeti (aŭ pruntepreni aŭ viziti bibliotekon) revuon "**L'autre Pravda**", kaj tralegi tie artikolojn de sovetiaj ĵurnalistoj pri Afganio, "devo" kaj Senmorteco.

Kaj ankoraŭ : Espereble, tute-tute superflua rimarko : **Ĉio, kion** mi skribis, apartenas al **miaj** pensoj, do neniu el miaj parencoj (geamikoj) influis min. Mi havis grandegan tenton diri pli, paroli pli konkrete, sed mi venkis tiun tenton. Ĉar mi memoras : patrino, patro, fratino, geavoj, amikoj - ili ĉiuj

estas Tie! Mi ne volas, ke oni persekutu ilin pro mia plezuro paroli en "Laŭte!". Jes, diros vi, nun ja estas alia epoko, tiu de Publikeco, reformoj k.s. En la hodiaŭa gazeto mi legis pri liberigo de Jenriĥ Altunjan kaj mi saltis pro ĝojo. Sed vere plori pro ĝojo oni povos nur tiam, kiam estos ŝanĝitaj kriminalaj kodeksoj, kiam malaperos hontindaj artikoloj pri "kontraŭsovetia agitado kaj propagando". Tial, bonvolu nomi min nur "Oksana". Dankon.

#### **Nicole DEJEAN :**

Ambaŭ, milito kaj terorismo estas racie elpensitaj murdoj, detruoj, kiuj trafas civilulojn, kiujn oni foroferas por venki.

Kio ĉefe diferencigas ilin, tio estas ke la unua estas laŭleĝa, decidita de ŝtatestroj, la dua kontraŭleĝa. La unua apartenas al reguloj de politika kaj ekonomia ludoj, la dua malaranĝas tiujn regulojn, provas aliajn metodojn. Pro tio la militistoj, la ŝtatestroj mallaŭdas la terorismon (pri kio la gazetaro multe parolas, skribas).

Sed ne estas tiel simple klarigi, ĉar "militista arto" daŭre evoluas ĉu teknike, ĉu taktike, ĉu "etike". Terorismo povas aspekti kiel pli-malpli nova rimedo por militi... Kaj milito, terorismo ambaŭ povas prezenti tre diversajn aspektojn, ampleksojn.

Ni bone scias, ke nuntempe sur nia planedo svarmas konfliktoj, militoj, sed preskaŭ ĉiuj en la plej malriĉaj landoj... La batalkampoj estas en la "Tria Mondo" kaj la terorismo (laŭ komuna senco) multobliĝas en la "riĉaj landoj"... ĉu strange ?

Kiuj vendas armilojn, al kiuj profitdonas la militoj ?

Ni bone scias, ke ĉiutage miloj da homoj kaj inter ili multe da infanoj, mortas pro malsato, pro mizero, en landoj, regionoj kondamnitaj de moderna ekonomia sistemo, de politikaj elektoj fare de tiuj, kiuj posedas la potencojn mondscale... ĉu tio ne estas grava terorismo, la plej insida, la kialo de ĉiuj aliaj terorismoj?...

Ĉu ankaŭ nuklea, kemia, bakteriologia vetarmado ne estas alia ne malpli monstra terorismo, kiu minacas milionojn da civiluloj je ĉiuj aĝoj ?

Laŭ mi, milito estas terorista, kaj terorismo militista ; ili estas forte ligitaj. Ambaŭ ili estas perfortaj, ruinigaj, vanaj kaj frenezaj. Kun Oksana mi opinias, ke neniu celo pravigas, rajtigas la rimedojn, ĉar kiel diras bela aserto : "La celo

estas en la rimedoj same kiel la arbo estas en la semo".

Mi ne scias, ĉu tria mondmilito jam komenciĝis, sed mi pensas, ke nur monskalaj solvoj forigos la eksplodajn situaciojn, la konfliktojn militistajn, ekonomiajn, politikajn... Ne eblas eskapi el tiu respondeco!...

**J.G. :**

*Terorismo estas grava kaj aktuala temo en Eŭropo, sed ankaŭ en Mezoriento.*

*Terorismo estas kelkfoje faro de individuoj aŭ de malgrandaj grupoj, kiuj opinias (prave aŭ ne), ke ili ne havas alian rimedon por altiri la atenton pri siaj depostuloj. Ili uzas simbolajn agadojn sed sen atenci la personojn. Ekz-e, bruli flagojn, eksplodigi barilojn...*

*Pri tiu "terorismo" oni ne povas uzi la vorton : milito. Aliaj teroristoj estas organizitaj laŭ strukturaj movadoj, kiuj deklaras uzi la "armean batalon" aŭ la "urban gerilon" kontraŭ la kapitalismo aŭ la imperiismo. Ili uzas armilojn, eksplodilojn kontraŭ simboloj : sidejoj de fabrikoj, bankoj, ktp, sed ankaŭ kontraŭ personoj reprezentantoj de la socio, kiun ili kontraŭstaras : fabrikestroj, ambasadoroj... Oni preskaŭ povas diri, ke tiu terorismo estas civila milito. La aktivuloj de la "Ruĝa Armea Frakcio" en Fed. Germanio, "Ruĝaj brigadoj" en Italio, "Rekta Agado" en Francio, ktp, sin konsideras militistoj dum siaj procesoj. Tria kategorio de teroristoj estas tiuj de Mezoriento, kiel la Palestinanoj aŭ Libananoj. La unuaj sin konsideras en militstato kontraŭ Izraelio, kiu rabis ilian teritorion. La Libananoj estas gvidataj de religia fanatikismo kiel la "Hezbollah'oj" aŭ en diversaj milicoj, kiuj estas ligitaj al fremdaj landoj (Sirio, Irano, Izraelio). Pri tiuj terorismoj oni povas paroli pri interlandaj militoj.*

*Ĉu terorismo estas pli fiago ol tradicia milito ? En la du formoj senkulpuloj estas aĉe murdataj! Teroristoj estas ofte "malesperuloj", kiuj ne plu fidis al la tradiciaj batalrimedoj : balotoj, strikoj... sed ĉu mortigi fabrikestron estas efika rimedo por malaperigi kapitalismon, aŭ mortigi generalon taŭga rimedo por malaperigi armeon aŭ militon ? Kaj laŭ pli larĝa vidpunkto ĉu perforto povas solvi iun ajn socian problemon ?*

**Jean-Claude :**

*Laŭ mi, terorismo estas ja milito, sed sen la kutimaj formalaj oficialaj (juraj, politikaj, ktp...). Pro tio la teroristo estas rigardata kiel simpla murdisto, ulo senmorala kaj fiinda, kaŝaganta por si mem aŭ por iu alia, kontraŭ senkulpaĵ civit-*

*anoj, pro motivoj kaj celoj nekonfeseblaj.*

*Malgraŭ tio, kolerigite de la maljusteco en la mondo, kiu el ni "en sia kuirejo" neniam opiniis, ke la teroristoj pravas, almenaŭ kiam temas nur pri biendetruoj ?*

*Fakte, ĉu ili pravas ? Tiel metita la problemo estas sen-solva. Estus eble bone rigardi terorismon iom kiel la videblan parton de glacirifo. Ĉu ĝi ne estas respondo al alia perforto (ŝtata, ekonomia, rasa, ktp...) ? Ĉu ĝi klare ne montras, ke alia maniero pensi, vivi, fariĝis nepre necesa ? La kaŭzoj estas konataj, solvoj jam de longe proponitaj, kaj tie kaj ĉi tie sukcese provitaj. Sed ili estas rigardataj kiel utopio, aŭ, pli grave, kiel danĝero. Danĝero kontraŭ kio, kontraŭ kiu ?*

**Suzanne :**

*Terorismo : tiu ĉi vorto taŭgas por diversaj agadaĉoj el diversaj fontoj.*

*Laŭ la agintoj, oni prezentas la faktojn kiel kvazaŭajn heroaĉojn, ekzemple la afero Rainbow-Warrior. Tiaspecaj agadaĉoj ofte estas kaŝe plenumitaj, escepte de hazarda okazaĉo, kiu konigus ĝin al la publiko. Male, oni distrumpetas la aliajn, eĉ troigante, por havi pretekston redukti la liberon de la civitanoj, celante plifirmigi la ŝtatpotencon, ian politikan agadon, unuvorte, bremsi la individuan opinion, aspiron, la pensliberecon.*

*Jen, laŭ mi, diversspecaj terorismoj :*

- 1) obĵetantoj, pacifistoj, anarkiistoj, "Atestantoj de Jehovo" diversspecaj homaranistoj, inkluzive de esperantistoj, aĉe enkarcerigitaj.*
- 2) laŭdi la protekton al la vivo, kaj vendi la murdrimedojn ĉie sur la planedo.*
- 3) trudi la militon = amasbuĉadon al la popoloj.*
- 4) trudi aĉajn laborkondiĉojn, malfacilan kaj malagrablan vivkondiĉon, taksante minimume la salajrojn kaj similajn.*
- 5) simila agado pri kuracadoj, vakcinadoj, ktp, ktp.*
- 6) mortigi studentojn, liceanojn, laboristojn strikantajn, eĉ preterpasanton, ktp, ktp.*
- 7) masakroj de Hienghene, kaj multaj aliaj en Nov-Kaledonio.*
- 8) en tiu regiono, la nukleaj provoj, kiuj naskis (as) teratogenajn sekvojn... ĉie similaj sekvoj okazas pro, ekzemple, funkciantaj atomcentraloj.*
- 9) la acidaj pluvoj, konsekvenco (inter aliaj) de peza oleo. La poluciado de la riveregoj, riveroj, riveretoj, lagoj, maro. Unu el la plej famaj, kaj ĵus okazinta, tiu de Rejno. Kelkaj kulpantoj pri tiu ĉi evento : Sandoz Ciba Geiart*

- 10) Sed tiaj, ofte nerebonigeblaj naturdetruadoj, ne sufiĉas al la homo ; per atomarmila butono, eblas al li detruo ĉian vivon sur la planedo.
- 11) Plia terorisma agado : la ostaĝoj, kiuj suferas pli-malpli longdaŭran malliberecon, des pli longa, ju pli oni estas ĉe la lasta parto de la socia hierarkio. Tiaj mensaj, kaj eble korpaj suferoj, pro merkataj, potencaj ŝtatspekulacioj. Feliĉe, spite la oficialajn deklarojn pri necedemo, kaŝe okazas intertraktado, ekzemple : ŝuldo de 335 milionoj da dolaroj eksensuldiĝas nun/ aŭ Reagan vendis armilojn al Irano.
- 12) La scienca eltrovo pri bakteria armilo kaj pri medikamentoj okazigas de tempo al tempo neatendatajn sekvojn : ekz. pri S.I.D.A., medikamento transdonis (as) ĝin... nur nun la publiko tion scias... pri la haladzoj post Ĉernobyl, same okazis (prokrastita informado).
- 13) La hontinda forpelo de enmigrintoj (intencita incendio de la domo, kie loĝis enmigrintoj : ses infanoj brulmortigitaj). Vaskaj rifuĝintoj forpelitaj al Hispanio...  
Mi ĉesigas tiun malgajigan liston. Uf!

#### **Jakelino : STRUKTURA PERFORTO KAJ REAGA PERFORTO**

Bombo eksplodas en pariza granda magazeno kaj mortigas plurajn aĉetantojn, i.a. esperantiston. La kulpintoj estas teroristoj.

Turka manlaboristo konfidas al amiko, ke li ne esperas vivi ĝis alta aĝo, ĉar la laborkondiĉoj en FRG estas tiaj, ke ili difektas lian sanon. Ĉu lia mastro estas teroristo ? Eventuale tiun mastron oni konsideras kiel kulpinton, ĉar li ne respektis la laborleĝaron, sed neniu parolas pri terorismo.

Kial tiu diferenco ?

Ĉar oni distingas inter ĉiuj perforto, kiujn listigis Suzana, du kategoriojn de perforto :

- la perforto struktura estas la tuto de la maljustaĵoj, sur kiuj baziĝas socio. Ekzemple, statistikoj montras, ke, eĉ kun respekto al la laborleĝaro, manlaboristoj vivas malpli longe, ol vivas intelektuloj. Ĉu iu murdisto senigas manlaboristojn je la 10 lastaj jaroj de iliaj vivoj ? Ne, tion oni ne povas diri. La perforton montras nur matematikaj konsideroj. Temas pri struktura perforto. Socio povas esti pli aŭ malpli perforta. Ekzemple, post 2 jaroj da senlaboreco en Francio, mia eksedzo plu ĝojis, ke li sukcesis foriri el Pollando. Tamen mi konas neniun socion, kiu ne havas perfortajn bazojn.

- la reaga perforto, t.e. la perforto, per kiu iuj ribelas kon-

traŭ la socio.

La amaskomunikiloj partoprenas en la struktura perforto. Tiu perforto ne estas nur fizika (la klabo de policisto sur la kranion de manifestaciinto), sed ankaŭ psikologia, ideologia. Kia ajn ĝi estas, la ideologio de la regantoj predikas obeon kaj fifamigas ĉian ribelon. Nuntempe, la senlaca ripetado de la vorto "terorismo" kontribuas en la senĉesa klopodado de la regantoj prediki obeon al la reĝoj.

Tion montras jena fakto : antaŭ nelonge, banditoj pafis al francaj policistoj. La polico sukcesis ilin kapti, kaj montriĝis, ke ili apartenas al socie altrangaj familioj, unu eĉ estas filo de iu nobelo. Komento de televida ĵurnalisto : "La polico unuavide kredis, ke pafis teroristoj, sed montriĝas, ke ne pri tio temas, ĉar unu el la arestitoj estas nobelido". Do klare : se al policisto pafas arabido, tio estas terorismo. Sed se al policisto pafas nobelido, tio ne estas terorismo. En decembro policistoj batadis arabidan studenton, kaj, ĉar tiu junulo havis malsanajn renojn, tiu batado lin mortigis. Komento de sinjoro Pasqua, ministro pri internaj aferoj : "Se mi havus malsanan filon, mi malpermesus al li fari stultaĵojn nokte." Do klare : kulpas pri la morto de tiu studento ne la polico, sed lia patro, ĉar li permesis al li promeni nokte sur publika placo, kie ĵus okazis manifestacio. Ĝojinde, pro la kuraĝa interveno de la ŝtatekretario pri homrajtoj, oni finfine ne punos la patron de la mortinto pro misedukado de la filo.

Ke ni devas esti konsciaj, ke la senĉesa uzo de la vorto "terorismo" partoprenas en la kondiĉado de niaj cerboj nin preparanta akcepti la strukturan perforton, jen kio ne signifas ke ni devas akcepti ian ajn formon de reago kontraŭ la socia maljusteco. Franca malliberulo iam skribis al mi, ke ĉia ago malleĝa estas revolucia ago. Mi rebatis, ke mi ne nomas revoluciojn la du turkojn, kiuj iam min seksperfortis, kvankam kompreneble seksperforto estas malleĝa.

Mi konsentas kun la aserto de Gandhi, ke "la celo estas en la rimedoj, same kiel la arbo estas en la semo". Se la celo estas konstrui justan socion, ne ĉiuj rimedoj estas taŭgaj por tiu celo.

Mi neniam sukcesis kompreni, kiel oni povas konstrui justan socion metante bombon en la parton de granda pariza magazeno, kie oni vendas ludilojn, eĉ elektinte por tion fari tagon, kiam lernejoj estas fermitaj, kiel ke ludilvendejoj havas pli da klientoj, ol kutime. Mi ne povas juĝi tiujn, kiuj tiel faras, ĉar ilin mi ne komprenas. Verŝajne temas pri mensmalsanaj homoj, aŭ pri homoj, kiuj spertis tiom fortan strukturan per-

forton, ke ili perdis ĉian estimon al la homa vivo kaj digneco. (Mi pensas interalie pri terure subpremitaj nacioj, kiel armenianoj aŭ palestinanoj). Nepre la socio, eĉ maljusta, rajtas sin protekti kontraŭ tiaj homoj, sed mi ne scias, kiel.

Tolstoj iam provis klarigi al anarkistoj de sia epoko, ke ne utilas mortigi la caron. Tamen la ideo, ke oni devas mortigi la ŝtatestrojn, plu ekzistas. Mi renkontis antaŭ kelkaj monatoj sicilian anarkiston, kiu tiel pensas. Laŭ li, estas devo de anarkistoj mortigi reĝojn, imperiestrojn kaj ceterajn kronitkapulojn. Ĉar tiu konversacio okazis en Metz, mia eksedzo, lia kunulino kaj mi proponis, ke li veturu al Luksemburgo por tie mortigi la granddukon. Sed li respondis, ke la grandduko de Luksemburgio ne estas tirano, ĉar li ne havas realan politikan potencon. Do ni proponis, ke li veturu al Parizo por mortigi ĉefministron Chirac : la arabidan studenton mortigis ŝtata polico, pri ŝtata polico kompetentas la ministro pri internaj aferoj, kaj la ministrojn nomumis ĉefministro Chirac. Mia eksedzo diris, ke malgraŭ la komplikeco de la franca konstitucio oni povas aserti, ke Chirac estas ĉefministro, ĉar lin nomumis Mitterrand. Mi konsentis pri tiu aserto, do ni proponis al nia kamarado mortigi Mitterrand-on. Sed li respondis, ke Mitterrand ne estas tirano. Do ni demandis, kio estas tirano, kaj li respondis, ke tirano estas homo, kiu respondecas pri la morto de pluraj homoj. Do ni provis esplori, kiom da arabidoj la franca polico ankoraŭ devos mortigi, ĝis li konsideros, ke nia ŝtatestro estas murdenda tirano. Ni ne ricevis klaran respondon. Ni demandis ankaŭ, kion la efektiva murdo fare de anarkistoj de kelkaj kronitkapuloj kaj ceteraj ŝtatestroj ŝanĝis en la historio de la homaro. Ni ricevis neniun respondon, krom la aserto, ke mortigi tiranon estas devo. Nia amiko eĉ surprizigis, ke ni povas nomi "murdo" la mortigon de ŝtatestro. Do klare estas, ke la motivo, kial li (diras ke li) volas mortigi ŝtatestrojn ne estas la racia serĉo de la plej efika metodo por liberigi la ekspluatatojn, sed ia morala devo iom mistika. Fakte, laŭ la etiko de kelkaj popoloj (ĉu ĉefe la mediteraneaj?), sin venĝi estas devo. Pri tio Kropotkin skribis... sed ne, mi ne ĉiam tedu laŭtulojn per la ripetado de la samaj aferoj! Pri tiu aserto, ke sin venĝi estas sankta devo, estas konsento inter teroristoj kaj la verkinto de la franca nacia himno (originala titolo : militkanto por la rejnarmeoj). Jen la teksto de la lasta strofo, nomita "strofo de la junuloj" : "ni eniros la vojon, kiam niaj pliaĝuloj tie ne plu estos, ni trovos tie ilian polvon kaj la spur-ojn de iliaj virtoj. Malpli emaj ilin postvivi ol kunkuŝi en iliaj ĉerkoj, ni havos la subliman orgojlon ilin venĝi aŭ ilin sekvi".

Do klare : estas devo de la junuloj plu militi por venĝi tiujn, kiujn jam mortigis la milito. Sed io maltrankviligas min : la junuloj devas pli emi kunkuŝi en ĉerkoj ol postvivi la jamajn mortintojn. Per lotumado inter gekolegoj, mi akiris diskon pri kantoj de francaj paraŝutistoj : ankaŭ ili preferas morti glorie por Francio, ol doni al ĝi la venkon. Ĉu soldatoj, kiuj preferas morton ol venkon, povas taŭge defendi popolon ? Mi demandas min serioze, ĉu la celo de Maqbool Butt estis liberigi Kaŝmiron aŭ heroe morti sur pendigilo. Kion pozitivan li faris por subprematoj ? Nenion! Sed li glorie mortis, do li postmorte rajtas la rangon de martiro de la subprematoj, amen! Antaŭ kelkaj tagoj, mi registris biografion de Elizabeta de Aŭstrio (la fama Sisi). Sisin anarkisto mortigis en Genevo. Tiu anarkisto ne riskis la mortpunon, ĉar ĝi ne ekzistis en la ĝeneva kanton, kaj li petis la svisan justicon lin juĝi laŭ la leĝoj de alia kanton, kie ekzistas mortpuno, ĉar lia plej kara deziro estis, ke oni lin gilotinu. Finfine oni kondamnis lin al dumviva mallibero, laŭ la leĝo ĝeneva. Ĉu la morto de Elizabeta de Aŭstrio alportis ion ajn pozitivan al la subprematoj de la aŭstra-hungara imperio, pri tio mi forte dubas.

Se terorismo rezultas el la volo glorie morti, oni ne povas konsideri ĝin kiel revolucian luktometodon, sed nur kiel iun formon de mensa malsano. Bedaŭrinde, la maniero, kiel oni traktas mensajn malsanojn foje estas pli kruela, ol la mortpuno. Do mi ne havas la solvon.

Restas la problemo, per kiuj aliaj metodoj oni povas ribeli kontraŭ la struktura perforto por alveni al justa socio. Laŭ mi :  
- se minoritato volas ŝanĝi ordon per armiloj, ĝi povas sukcesi, sed ĝi kreas novan strukturan perforton. La perforto estas la akuŝistino de la perfortaj socioj.  
- se minoritato volas ŝanĝi la socion sen armiloj, ĝi povas akiri kelkajn malgravajn ŝanĝojn, sed ne la tutan ŝanĝon de la socio.  
- se la plimulto volas ŝanĝi la socion, ĝi povas tion fari ankaŭ sen armiloj (relegu la verkon de Laboesi pri memvola servuto). Sed la ideologio de la regantoj estas tiom forta, ke tiu hipotezo malofte renkontiĝas.

Do finfine, ĉu nia malamiko estas la terorismo, aŭ la ideologio, kiun oni trudas al ni, kaj en kiu partoprenas la uzo de vortoj kiel "terorismo" ?

P.S. : Mi kunsendas fotokopion de teksto, kiun mi ricevis, kredeble ĉar mi iam estis delegito de UEA pri homrajtoj. Mi scias nenion pri Mustaq Ahmed, krom, ke li estas nun en fama pariza malliberejo.



Noto de la red. de L! : La dokumento, transsendita de Jakelino, entenas al mi ne klarajn vortojn, eĉ frazojn. Mi redaktis laŭpove, strebante konservi la tekston plejeble proksima al la originalo.

## REVOLUCIO DE KAŜMIRO

### Ho, Maqbool Butt, vivados vi !

Ekde komenco ĝis la nuna tago baraktado por savado de homaro daŭris. Jen vidiĝas al ni la batalo de Husajno prezentanta ekzemplon de sindono kaj jen ni vidas grandajn personojn, kiel Isa, Mansur, Sokrato, Tipu, Salahuddin Ajubi kaj Omar Muftar de Libio, sin donantaj al la martireco de libero.

Baze, homo estas kreita libera, tamen la imperialismaj fortoj ĉiam subpremadis por siaj propraj celaĉoj la malfortajn naciojn. Historio atestas, ke en ĉiu epoko liberemuloj klopodis fordistranĉi la ĉenojn de sklaveco, kaj la satanaj fortoj punis ilin pro ilia laboro por honora kaj libera nacia vivo. Jen vidu, niaj bravuloj martiriĝis antaŭ la malliberejo de Sirinagar en 1931 kaj jen notu, oni abonis (tiel!) ilian nomon al la brita imperialismo en 1846. La punado ĝis nun daŭras en la formo de baharta imperialismo. Duonjarcenta baraktado de kaŝmiranoj enhavas penigajn aspektojn. Daŭras la ludo de ŝtonkora imperialismo... punado por neniu kulpo... pendigado... malliberigado.

Kvin jarcentojn antaŭe, kiam sklaviĝis la kaŝmiranoj, patrinoj donis al martirejo siajn filojn, fratinoj siajn fratinojn, kaj filinoj siajn patrojn. Ghazi Chak oferis sian vivon batalante al la "Mughals". (...) Jen martiriĝis Raja Gohar Aman. Kvincent miloj de Ĝammu ruĝigis teron de sia patrolando per sia sango, por ke ĝi estiĝu libera.

Tenante alta la flagon de longa, granda, mallaciĝema kaj pacienca baraktado al libero, la granda liberulo de Kaŝmir, S-ro Maqbool Butt instruis al ni la grandan lecionon de libereco. Al la subpremata kaŝmira nacio, senigita de baza rajto de libereco, celtabulo de imperialismo por kruelado kaj ekspluatado, li donis novan direkton de revolucia klopodo. Diris li revolucian vojon de liber-revolucia milito. La liberemulo de Kaŝmiro donis sian vivon sur la pendigilo kaj aldonis novan ĉapitron al la libero de kaŝmiranoj.

La pompo, kun kiu oni marŝas al la martirejo, ĉiam postvivas. Kiel li diris : "Estas preferende morti sur pendigilo batalante kontraŭ la malamiko de vero, ol morti sur la lito." Sur vojo de vero li ĉie en la fifama "Matab Bagh", "Shahi Qala", "Lal Qala", en ĉiu punaĉejo, tenis alta la honoron de liberemuloj de Kaŝmiro. Maqbool Butt estis la savanto de subpremata kaj sklavigita kaŝmira nacio. La martiro de Kaŝmiro estis ne nur la savanto de kaŝmiranoj, sed ankaŭ pledanto de tuthomareco, libereco de Francujo, liberemuloj de Vjetnamo, bravuloj de Palestino kaj subpremataj nacioj de Afriko. Estis li la plej granda signo de baraktado de kaŝmiranoj kontraŭ

sklaveco, krueleco, kapitalismo kaj ekspluatado al kaŝmiranoj. La baharta imperialismo pendigis lin pro la kulpo postuli rajton de libereco por la kaŝmiranoj. Ĉu ili supozas, ke pendiginte unu Maqbool Butt, ili sukcesas en siaj ficeloj ? Ne. Neniam! La liberemuloj de Kaŝmiro ĉiam antaŭen marŝos sub lumo de lampo lumigita de Maqbool Butt. Li donis al ni honoron pri kiu ni rajtas vere fieri. Li diris lecionon de ĉiama batalado al ni, kontraŭ ĉiuj tiuj, kiuj malliberigas, ekspluatadas, subpremas kaj sklavigas la homojn. Li lumigis lampon de liberamo en la koroj de kaŝmiranoj. Ĉiam, kiam oni tralegos la historion de Kaŝmiro, oni trovos lin kiel la plej grandan gvidanton de kaŝmiranoj.

Ekde tiam ni subprematoj elmarŝis kun kuraĝo de murdejo al murdejo. Murdiganto tremadas.

Verkinto : Mushtaq Ahmed. Tradukinto : Amjad Butt. 27.2.1987

\*\*\*\*\*

## LA LINGVISTIKA MIOPECO DE L'GREKA-ARMENA

### FILOZOFO GEORGO GORGIADO

(pli konata per sia rusigita familinomo GURDJIEFF)

En sia verko "RAKONTOJ DE BELZEBUO AL SIA NEPO" (aŭtentika ekzemplo de tio, kio povas esti galimatio!), libro 2a, kastiliane sur p.20a al 24a, la greka-armena GORGIADO pritraktas la problemon de la diverseco de lingvoj sur nia planedo kvalifikante la situacion "absurda mirindaĵo", kaj li diras, ke "kiam loĝanto troviĝas pro hazardo en lando de malsama parolo aŭ lingvo, li povas establi neniun rilaton kun siaj similuloj, se li ne lernas ilian lingvon."

Kaj Gorgiado aldonas : "Al mi mem, perfekte scipovanta 18 lingvojn, okazis foje, dum miaj vojaĝoj, troviĝi en tiaj kondiĉoj ke mi ne povis akiri la plej necesajn aĵojn, malgraŭ tio ke mi havis pli ol sufiĉe da mono, ĉar mi ne scipovis la lokan lingvon!"

Poste, li mencias ke : "...en asembleo de reprezentantoj (komence de la 20a jarcento), kies celo estis adopti lingvon internacian por uzado grandskala, oni alvenis al la konkludo ke Esperanto neniel konvenas tiucele." Tio, kion Gorgiado ne klarigas, estas ke en tiaj asembleoj ĝenerale ĉiu reprezentanto aŭ delegito pretendas nur (kaj plue pretendadas) trudi sian propran nacilingvon kiel solan lingvon planedan!

Daŭrigante, li aldonas ke : "la INVENTISTOJ \* de tiu nova 'lingvo' (E-o) sendube imagis ke lingvo estas io analoga al siaj nuntempaj 'sciencoj', kiun eblas ellabori hejme sidante, en sia studoĉambro; kaj certe al ili ne venis en la menson ke neniu lingvo pli aŭ malpli 'praktika' povas formiĝi, se ne estas en la daŭro de multaj jarcentoj kaj krome interne de procezo de pli aŭ malpli normala ekzistado."

"Tiu nova elpenso, Esperanto, apenaŭ povas taŭgi al la kokinoj de l'respektinda mulao Nasredino, kiam ili haste rakontas liajn spritajn anekdotojn proprariske."

Ĉi tiuj konceptoj de la greka-armena filozofo Gorgiado estas tute eraraj kaj montras nur lian specifan blindecon, lian totalan nescion pri la problemoj de l'internacia komunikado, pri la konsisto de E-o kaj ĝia funkciado! Unue, ĝi ne estas lingvo inventita, maksimume ĝi estis konscie konstruita surbaze de 75 procentoj da latino, kiu certe ne estis farita "hejmesidante en studoĉambro". La plej trafa difino pri E-o (por ke ne-Esperantisto komprenu ion!) estas ke ĝi temas pri la latino simpligita kaj modernigita ĝis maksimumo, al kiu la litva oftalmologo kaj lingvisto eksterordinara Lazaro Ludoviko ZAMENHOFO provizis per 16 fundamentaj reguloj gramatikaj sen esceptoj!

Tio pri la kokinoj, kiel spritaĵo povus esti amuza, sed ĝi havas neniun sencen! Bedaŭrindas ke viro ekstera kia GORGIADO, kiu defendis la disvolviĝon de la kompreno je ĝia plej alta nivelo, elmontras rilate la problemon de interreta komunikado absolutan mankon de kompreno! Kaj al tio neniel helpis al li la scio de 18 lingvoj!

Konstateblas do ke por trafa pritrakto de temo, necesas scipovi ĝin funde, ne supraĵe! La 'objektiveco' de Gorgiado ĉi-rilate rezultis pure subjektiva! Tial do ni rajtas aserti kun plena objektiveco ke Gorgiado sciis nenion pri la problemoj de la diverseco de lingvoj kaj ĝia radikala, praktika kaj senpartia solvo per la Interreta Lingvo Esperanto, de elstare neŭtrala karaktero. Kiom pli bone se li estus dirinta nenion; oni supozus lin klera, sciplena ĉi-rilate, anstataŭ eltrovi la supre cititan sensecaĵon. Ŝajnas ke por ĉi tio la instruoj pri la transforma psikologio ne sukcesis "veki" lin. Se li estintus iom pli konscia, li dirintus ion trafan!

Videble, ankaŭ Gorgiado spertis ĝenojn derivitajn de la diverseco de lingvoj, kion li trafe kvalifikis absurda situacio. Ni miras nur ke li ne komprenis la esencen de l'problemo kaj ĝian eventualan solvon.

Estas tre klare, ke nacia lingvo ĉiam estos repuŝata fare de aliaj, ĉar se oni elektus ĝin por universala uzo, tio signifus privilegion por la loĝantoj de nacio, kaj malprofito por la ceteraj, kiuj estus devigitaj studi ĝin. Anstataŭe, per Esperanto, la fortostreĉo (kvaroble malpli granda, ĉar ĝia gramatika strukturo kaj vortkunmetado estas multe pli facilaj) por lerni ĝin estas justa, ĉar ĝi apartenas al neniun landon partikulare, sed al la tuta homaro. Ĝi estas do laŭ propra rajto la 'Sola Lingvo Planeda'!

\* Anstataŭ "LA INVENTISTO", ĝusta estas : LA INICIATINTO.

## ERGOTO DE BONAERO

RIMARKO : Traduko kaj publikigo de ĉi tiu artikolo en nacilingvoj estas permesata.

## VALO



### VORTOJ DE MALJUNULO

\*\*\*\*\*

### "PERVERSA EFIKO" de teknika progreso

*Mi prezentis al la urbestro kelkajn sugestojn pri ekologiaj demandoj. Responde mi ricevis inviton al renkonto kun la vicurbestro delegita pri tiuj aferoj. Li estas simpatia juna viro, vigla kaj inteligenta, kiu tre afable min akceptis. Sen konsulti notojn, sen relegi mian leteron, sen redemandi min, li respondis al ĉiuj miaj demandoj, kompetente, klare, precize. Evidente li bone konas la temojn; li eĉ ekfunkciigis konkretajn solvojn, pri ĉiuj punktoj, escepte de unu.*

*Mi menciis la fuŝkonsumadon de grandegaj kvantoj da paperoj por reklamoj, kiuj plenigas tutajn paĝojn de gazetoj kaj magazinoj, kaj ĉiutage plenstopas niajn leterkestojn. Tiuj paperoj ne uzitaj, ofte ne legitaj, eĉ ne rigarditaj, senutile iras al rubejoj. Ilia fabrikado kaŭzas detruadon de arbaroj, kiuj estas la pulmoj de la tero, tio estas moderna ekologia plago. Nu, tion oni ne povas malhelpi. Oni povus almenaŭ organizi sisteman kolektadon de tiuj misuzitaj paperoj, kaj ilin "recikladi", kio iome limigus la damaĝon.*

*La vicurbestro diris: "Vi tute pravas, kaj ni plene konscias pri tiu problemoj. Sed antaŭ kelkaj monatoj la kurzoj de la papero sur la internacia merkato tiel falegis, ke nun la kolektado kaj reciklado pli multe kostas ol la fabrikado de nova papero. Tio estas bedaŭrinda fakto, kontraŭ kiu nek vi nek mi ion povas."*

*Konsekvencoj:*

*1 - La prezo de la papero estas nun tiel malalta, ke la reklamistoj ne bezonas ŝpari ĝin.*

*2 - Oni ne reutiligas la uzitajn paperojn, kaj oni plu faligas arbojn por provizi la paperfabrikojn.*

Jen ni tuŝas unu el tiuj teknikaj progresoj, kiuj malaltigas la produktokostojn, tial kaŭzas senlaborecon kaj fuŝkonsumadon, kaj kiujn ne sekvas necesa alĝustigado de ekonomia organizo. Oni freneze fabrikadas tro abundajn varojn, detruante naturajn riĉaĵojn, kaj dume oni ne scipovas savi homajn vivojn kontraŭ manko de nutraĵoj kaj higieno, nek savi la arbarojn, kiuj provizas nin per nemalhavebla oksigeno. Necesajn iniciatojn malebligas la mono, la nevenkebla profito.

Ĉu insisti ? Tro longe skribi pri tiu temo estus kontribui al tiu misuzado de papero, kiun mi vane denuncas - vane, ĉar kontraŭ ĝi, ho ve! "nek vi nek mi ion povas".

## PLEZURO DE LEGADO

"Pasinte la 60an jaron, oni ne plu legas, oni relegas.". Mi ne aprobas tiun vorton de malprogresema konsilisto, ĉar inter la amaso da presita papero, kiu ĉiumomente inundas la merkaton, fojfoje aperas kelkaj perloj. Tial mi plu legas volonte novajn librojn de novaj aŭtoroj. Sed mi ankaŭ relegas el tiuj, kiujn mi antaŭe ŝatis ; kaj ofte mi eltrovas en ili belaĵojn, kiujn mi preteratentis.

Nun mi relegas - kiomafoje ? - "Le Rhin" (Rejno) de Viktoro Hugo. Kia riĉa lingvaĵo, nutrita per historia klereco kaj erudicio! Kia vervo! Kia sparkebrila stilo, ofte specita per sprito kaj humuro! Kia poeto!

Mi estis 16-jara, kiam unuafoje mi renkontis tiun libron. De tiam mi revadis pri tiu fabela riverego. Kiam, ses jarojn poste, mi troviĝis sur la lokoj priskribitaj de tiu granda vojaĝanto kaj granda verkisto, mi ne estis elrevigita : mian revon egalas mia ravo. Mi eksentis fulmobatan enamiĝon al tiu lando, kaj mi ĉiam restis fidela al tiu juneca amo.

Legante mi retrovas nomojn, kiuj elvokas karajn bildojn. Belegaj urboj, Majenco (Mainz), Kolonjo (Köln) ; ĉarmaj mezepokaj urbetoj kaj vilaĝoj, Andernach, Obervezel, Baŭharaĥ ; pimpaj urbetoj, Boppard, Kaŭb, Rüdeshelm, Bingen ; Godesberg, la urbo-gardeno, plena de verdaĵoj kaj floroj ; insuloj meze de la rivero, la sinistra Turo de l'Musoj, la fiera fortikaĵo Pfalz, la monakinejo Nonnenwort ; la multaj "burgoj" (kasteloj kaj kastelruinoj), romanikaj kaj gotikaj preĝejoj ; la rokego Lorelej, la vitkovritaj montdeklivoj, la Sep Montoj, kaj ĉiuj mirindaj pejzaĝoj...

Multajn el tiuj lokoj mi vidis nur de malproksime, veturante sur ŝipo aŭ sur mia lokomotivo. V. Hugo vizitis ilin detale, ofte piede, kaj longe meditis. Fakte, ne ĉiuj detaloj

estas veraj. Oni scias, por ekzemplo, ke de Lorĥ al Bingen li veturis ŝipe, kaj li rakontas piedan vojiradon. Ne grave : tie la senperan sperton de la vojaĝanto anstataŭas la erudicia informiteco kaj la imago de la verkisto kaj de la poeto. Oni ĉion vidas kvazaŭ per propraj okuloj, kaj oni ĉion kredas. Tia estas la potenca magio de tiu legado.

## LEGANTE KLASIKAĴOJN

Mi havas libron, kiu pretendas instrui, "kion oni devas legi en sia vivo". Laŭ la aŭtoro, post la 60a jaro, oni ne legas plu, oni relegas. Kaj li konsilas relegi precipe "la Imitado al Jesuo-Kristo". Aliaj diras : "la Biblio" aŭ "la Korano".

Mi nun relegas la "Fundamenta Krestomatio"-n. Ĝi estas kolekto de tre diversaj pecoj, aŭ verkitaj de Zamenhof, aŭ de li kompilitaj, kontrolitaj kaj laŭbezzone korektitaj.

Al ĉiuj esperantistoj dezirantaj perfektigi en la lingvoscio, kaj precipe al verkemuloj, estas rekomendinde atente legi kaj mediti la antaŭparolojn al la unua eldono (1903) kaj al la kvina (1907), kaj sekvadi la en ili donitajn konsilojn.

Rimarkeble la pecoj verkitaj aŭ tradukitaj de Zamenhof konservis en sia lingvaĵo mirindan aktualecon. Male, pluraj aliaj enhavas kelkajn aŭ multajn arkaismojn, mallertaĵojn, idiotismojn laŭvorte tradukitajn el lingvoj naciaj (rusa, germana, franca...). Tamen la Majstro ne korektis tiujn makulojn. Tiel li donis ekzemplon de toleremo al tiuj puristoj, kiuj kritikis kaj kondamnas pretendatajn erarojn en la nomo de mi-nescias kiuj "reguloj" de ili elpensitaj, kvazaŭ ne sufiĉus la dek ses reguloj de la Fundamento. Zamenhof sin montris multe pli liberema, lasante ĉiun uzi la lingvon laŭ sia propra kompreno kaj gusto, kondiĉe nur, ke li ne deflankiĝu de la Fundamento.

Oni povas rimarki en pluraj lokoj forlason de balastaj sufiksoj, longe antaŭ ol Lanti, nutrite de klasikaj legadoj kaj asimilinte la spiriton de la lingvo, sistemigis tiun senbalastigon. Dume en aliaj lokoj svarmas tiaj balastaj sufiksoj. Zamenhof korektis nek tiujn nek tiujn ĉi frazojn, ĉar ambaŭ formoj estas pravigeblaj. Li lasis al ĉiu verkisto liberan elekton inter precizigaj afiksoj kaj plej aŭdacaj "senbalastigoj". El tiuj ĉi mi notis jenajn :

- en la novelo "La porcio de glaciaĵo", "bonordita senordeco", "enamita" ;
- en "El la vivo kaj sciencoj, Bagateloj, Kio estas vegetarismo", "sangitaj vestoj kaj manoj de buĉistoj" ;

- en "Grafologio", "enamitaj" ;
- en "El la poŝto", "respondaj" (respondecaj).

Dume, en "La loĝejoj de la termitoj" estas uzitaj multaj vortoj kun sufikso, kiel "longeco", "larĝeco", "grandeco", "alt-eco", "konfuzita labirinto", ktp.

Ke Zamenhof prezentis tiujn kiel tiujn ĉi verkojn kiel "modelojn", tio ne signifas, ke oni devas rigardi ilin kiel blinde imitindajn en ĉiuj iliaj detaloj. Ĉiu verkisto ĉerpu el ili nur tion, kio konvenas al lia propra lingva sento, kaj per tiu elekto konsistigu por si mem personan stilon. Tiel, mia opinio, oni devas legi klasikajn verkojn el la antaŭaj epokoj. Ĉu multe, ĉu plej malmulte da afiksoj ? Ĉu longaj frazoj kun multe da flanke artikigitaj propozicioj, ĉu tre mallongaj ? Tio dependas de la temperamento de la verkisto, kaj eĉ de lia momenta humoro kaj dispozicio. Kaj la prefero de la leganto iros al tio aŭ al tio ĉi laŭ lia propra gusto.

La modeloj proponitaj de la iniciatoro ne estas obee reproduktendaj ŝablonoj. La "lingvo de Esperanto" ne estas ia malvarma automato kun precize difinita programo, ne ŝanĝebla, unu fojon por ĉiam fiksita, ne evoluipova. Ĝi estas kvazaŭ animala organismo, certe biologie programita, sed nature elvolviĝanta, ĝi estas, unuvorte, vivanta lingvo. Sed tion povas kompreni nur tiuj, kiuj ĝin praktikas.

**Valo**

1887 - 1987

Ne atendu la duan jarcenton! Aliĝu tuj al la 60a S.A.T.-Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marŝo 22-29/08/1987 ĉe la bela "Opala Marbordo".

La O.K.K. (en Parizo) estas organizanta ĉion kiel eble plej bone por via komforto en la kvietaj libertempaj vilaĝoj Ambleteuse (apud Bulonjo-ĉe-Marŝo) kie vi agrable ripozos en 2- kaj 3-litaj ĉambroj. O.K.K. povas ankaŭ rezervi en hoteloj. Vi ĝuos fratecan etoson, interesajn prelegojn, kunsidojn, strandludojn, spektaklojn, vizitojn, ekskursojn en la pentrinda regiono. Viaj infanoj kongresetos aŭ sur la strando, aŭ en ludilplena infansalono, sub sekura vartado de du kamaradinoj sindonemaj.

Do, tuj petu aliĝilon ĉe la OKK-sekretariino : Juliette Ternant  
5, chemin du Gros Buisson, F 93800 Epinay sur Seine

Venu multnombraj! Aliĝu tuj!... krom se vi nepre deziras havi la lastan kongres-numeron aŭ... poste bedaŭri!

**Koffi GBEGLO :**

## MIAJ UNUAJ PAŜOJ EN LERNEJON

(El "De vilaĝo al ĉefurbo")

Pardonu, kara leganto, ke mi skribas pri "mi", pri mia vivo kiel lernanto kaj studento. Sed mia celo estas montri per konkreta ekzemplo, kiel malfacile estas por togolanda, kampara knabo, - kaj poste junulo - trapasi la dornoplenan epokon de studado.

Kiam mi estis apenaŭ kvinjara, mi multe interesiĝis pri tio, kion faras en la lernejo lernantoj, kiujn mi aŭdis kanti kaj reciti.

"Kredeble lernejo estas plaĉa loko", mi opiniis. Sed kion fari por esti tie akceptita ?

Pasis tempo. Sed kvankam mi tre deziris viziti la lernejon, mia patro vigle kontraŭstaris mian lernemon. Kontraste al li, Onklo KUACI, iom klera, insistis, por ke liaj genevoj ne restu malkleraj, kiaj estas liaj propraj gefratoj.

Mia situacio ege kortuŝis lin, ĉar mi estis jam sesjara kaj tiam ankoraŭ ne vizitis la lernejon. Reveninte de LOME al ANYRON-KOPE, mia vilaĝo, li riproĉis miajn gepatrojn pro tio kaj akuze diris, ke ili miszorgas pri mia estonteco.

Tamen pasis tagoj, monatoj, sed nenio ŝanĝiĝis ; mi restis kun Paĉjo kaj Panjo por hejme helpi en mastrumado.

Onklo KUACI opiniis la situacion netolerebla kaj lia mal-kontento akriĝis. Li sendis leteron al Paĉjo, kaj mi memoras kiel ĉi tiu riproĉis mian patrinon. Li kompreneble suspektis, ke ŝi ne povis sin deteni informi mian onklon, - fraton sian -, ke Paĉjo plu rifuzas al mi la permeson frekventi la lernejon.

"Pri kio temas?" demandis mia patrino. Sed li streĉe ne el-lasis eĉ unu vorton kaj subite kaj ploreme : "Mia patro neniam vizitadis lernejon. Ankaŭ ne mia patrino. Kial via frato tiel insistas, ke KOFFI lernu ŝteli, rabi kaj mensogi kiel la Blankuloj?"

- Ĉu en lernejo oni lernas ŝteli, rabi kaj mensogi?" rebate diris mia patrino.

- Mi kontraŭstaras tiun ideon, sed se vi mia edzino samopiniis kiel via frato, mi tamen helpos al la subteno de nia filo por lia studado."

Malgraŭ tiuj paroloj la letero de Onĉjo ne estis respondita.

Iam, iun dimanĉon, tintado de biciklo anoncis la alvenon de Onĉjo. "Estu bonvena" eliris el multaj buŝoj. Mi kuris al li kun ĝojo, eble ĉar mi sciis, ke en lia sako troviĝas kukoj. Sed sen atendi unu minuton, li abrupte vortis : "Mi venas ĉi tien por

KOFFI. Mi vere maltrankviliĝas pri li. Ne estas tolereble, ke li ankoraŭ ne ekvizitis la lernejon. Tio tute ne kongruas kun la nuntempa situacio. Mi ja scias, ke niaj antaŭuloj tion ne bezonis, kaj ke tamen ili dece vivis. Sed ĉio aliĝas tagon post tago. Ni devas "danci la nunan dancon" kaj adaptiĝi al la nuno. Niaj infanoj devas lerni skribi kaj legi, ĉar nur per tio la Blankuloj superas nin. Tiucele mi estas preta fari ĉion eblan por ke KOFFI iĝu lernanto ĉi-jare. Ekde morgaŭ li vizitu la lernejon. Jen por komenci liaj lernejoj vestaĵoj kaj la necesaj lerniloj."

Je tiuj vortoj mi tremis, ĉar mi memoris pri la vipo de la instruisto. Kiam mi iris al la puto por ĉerpi akvon, miaj samaĝuloj, lernantoj de li, montris al mi la vundojn okazigitajn de la vipado fare de li.

Antaŭ ol foriri per biciklo, mia onklo aldonis: "Estu atentema, obeema. Tiel vi plene komplezos min."

Mi konfesas, ke mi preskaŭ sendorme pasigis la nokton.

Fine, lundo! Mi rapidis prepari min, kio ridigis mian patrinon. Kie do estas Paĉjo? Post kiam mi ĵus decidis iri sola al la lernejo, mi vidis lin kun fiŝkorbo ĉemane, sed li ne rapidis.

"Nun ni iru!", li diris. Kaj mia koro elsaltis pro ĝojo kaj samtempe timo. Li marŝis malantaŭ mi, kvazaŭ li persekutus ŝteliston. "Rapidu antaŭ mi!", li diris per kolera voĉo. Tre certe li agis kontraŭvole.

La lernejestro estis samvilaĝano. Li venis renkonte al mi. "Ue zon Fo Ĝumenjon" (bonvenon, frato Ĝumenjon), li diris al mia patro. Lia voĉo tiel timigis min, ke mi lasis fali mian sakon, kaj ridis mia patro pro tio. Jes, mi tremis kaj timis, ĉar mi sciis, ke li estas tre severa.

"Mi scias, kio instigas vin ĉi tien hodiaŭ matene. Domaĝe, ke vi tiom atendis. Via filo estas pli ol sesjara. Mi akceptas lin kaj bone zorgos pri li. Fidu je mi, ke ĉio iros glate," li diris al mia patro.

En la klaso vokis min konatoj. "KOFFI, sidigu apud mi!". Fine per sia vipo la instruisto signis al mi, ke mi eksidu apud filino de najbaro.

Jen do lundon la sepan de oktobro 1963 komenciĝis mia vivo de lernanto.

Nia instruisto estis longnazulo kaj de granda staturato. Lia raŭka voĉo silentigis la klason.

Dum du plenaj semajnoj neniuj larmoj verŝiĝis. Mi pensis, ke la rakonto pri vipado estis nur imaga. Sed...

Sed lundon de la tria semajno, kia ŝtormo! "Kiu ne ĉeestis

la meson lastan dimanĉon?". Granda silento regis en la klaso. El sia poŝo li eltiris la liston de ĉeestintoj. Kun pluraj aliaj mia nomo ne troviĝis sur la papero.

Mi ne kutimis iri al la meso, ĉar mia patro estis fetiĉestro kaj ĉiudimanĉe okazis ceremonio en mia propra domo. Kial mi, ege manĝema, povus forlasi okazon manĝi paston kun viando preparitan por la ceremonio, kaj anstataŭ tio iri al kapelo kaj enui tie?

Eble vi vin demandas, kial mi elektis katolikan lernejon. Tute simple ĉar nur tia ekzistis.

La instruisto sin turnis al la pekintoj: "Vi ja scias bone kaj klare, ke katolika estas nia lernejo. Oni jam diris al vi, ke ĉeesti ĉiun meson estas devige kaj necesege. Ni estas tie kiel veraj kristanoj, ne kiel ateistoj aŭ paganoj. Kiel kutime mi donos al ĉiu ses batojn de bastono sur la gluteojn. Venu unu post la alia por ricevi vian punon." La tuta klaso ploris. Ĉu mi kapablos tion suferi? Ve! estis des pli kruele, ke mi eĉ ne manĝis antaŭ ol esti vipata.

Kial mi, tre respektata de la adeptoj de la fetiĉo de mia patro, devis esti tiel batita? Mi decidis min venĝi. Jes, mi ĉion rakontu al la fetiĉo, por ke ĝi punu la instruiston. Tamen post pripenso mi rezignis, ĉar mi timis, ke la instruisto estos mortigita de la fetiĉo.

Tiun tagon, kiam miaj gluteoj estis vunditaj, mi konservas tre precize en mia memoro!

\*\*\*\*\*

**Michèle FREUD :**

### Meditekskurso en la brila lando

*Kun okuloj nebulitaj de ektagiĝo, ni forlasas la alpan vilaĝeton ankoraŭ dormantan por iri admirari la bluan lagon.*

*La vegetaĵaro baniĝas en arĝenta roso kaj mi havas la eksterordinaran impreson penetri en feinan teneran universon. Mi pensas pri diamantaj mirindaĵoj de kristnaska arbo, kiu estus floranta en milda nokto.*

*Dum mi marŝas renkonte al la suno, mi memoras pri la poemo de franca verkisto Edmond Rostand : "La kanto de la koko estas amkrio por la lumo, por tiu oraĵo, kiu nomiĝas la tago, tio estas la krio de ĉio, kio bedaŭras sian koleran flamon, plumfasketon aŭ sian perlon ; tio estas la krio de la malseka herbejo, kiu petegas etan ĉielarkon je ĉiu verda pinto.*

Tio estas la krio de tiu, kiu deziras kanti, denove vivi, denove utili : esti bordkrutaĵo, sojlo, varmeta benko, ŝtono feliĉa esti varma por la mano. Finfine, tio estas la krio de la belo al la klareco, de ĉiu, kiu sopiras ĝoje labori sub la suno..."

Ni nun supreniras la vojetojn tra kampoj lumigitaj de la floroj : la gencianoj estas elegantaj en sia flava robo, la kampanuloj kantas la vivplezuron ; la delikataj centaŭreoj, la strangaj orkidoj, la dolĉaj akvilegioj brile ridetas al ni. Mi haltiĝas por ĝui tiun originan harmonion. "Ho, eta floro, printempa filineto, hela fajrero, cia gracieco donas al mi korpacon kaj serenecon."

La belo, kiel la muziko, malfermas la pordojn de luma kampo, kiu riĉigas, feliĉigas nin. La orientuloj ŝatas diri, ke la homo fariĝas tio, kion li kontemplas. Do ni fiksu niajn rigardojn al la lumo, la boneco, ni frekventu la belsemantojn kaj la optimistojn.

Ĉiu aspekto de la naturo instigas nin mediti. Ni ofte forgesas la veron de la malnova proverbo, laŭ kiu la plej bonaj aferoj estas senpagaj ; ĉar ni ĉiun matenon povas vidi la sunleviĝon, ĉeesti ĉiun aŭtunon, ĉiun printempon la migradan flugadon de la birdoj, la grandiozajn spektaklojn de naturaj mirindaĵoj ; ĉar tiuj aĵoj estas al ni disdonitaj kun tiom da facileco, konstanteco kaj certo pri ilia renoviĝo, ni tre ofte konsideras ilin normalaj. Tamen la pompoj de la tero, de la ĉielo, devus mirkonfuzi, ĉarmegi nin. Ni ĝuu ilin kaj ni vivu en stato de daŭra miraklo! Ni kreskigu ĉe la infanoj, dank'al muzika, desegna edukado, la observemon, tiel favorante la emon al la konscia ravo, kiu donas la psikan ekvilibron.

Grimpante, mi pensas pri la historio de la rilatoj inter la homoj kaj la monto.

Ĉiutempe, ĝi estis loko aparte privilegia. Tio estas tiel vera, ke, kiam la homoj ne havis suprojn, kie ili povis konstrui siajn sanktejojn, ili starigis artefaritajn montojn : piramidojn en Egiptio aŭ en Meksikio. Komence, la monto, videbla kaj ofte neirebla, alta kaj mistera, bela kaj terura samtempe, inspiris respekton, timon kaj raven. Dum kelkaj jarcentoj, ĝi estis dezerta, ĉar ĝi estis la restadejo ne nur de la Dioj, sed ankaŭ de la demonoj, drakoj, sorĉistinoj. La malnova tabuo rompiĝis nur sub la trudo de la cirkonstancoj : soldatoj, komercistoj, kiuj nepre devis transpasi montpasejon, ribelantoj, kiuj serĉis rifuĝejon. La alpismo disvolviĝis, kiam malaperis la legendoj, kiuj nutris teruran etoson ĉirkaŭ la loĝantaron.

Ĉi tiuj meditoj forgesigis al mi la krutecon de la vojo. Nun la suproj stariĝas unu post la alia por eskorti nin. Gustumante

la pacon de la grandaj izolejoj, mi frande trinkas la aeron, sorbetas ĝin kiel eliksiron. La ora verdo bonodorante la sovaĝan dianton estas kvietiga : mi transversas ĉi tiun dolĉecon en mian tutan korpon kaj mi sentas kvazaŭ sanigan mesaĝon novan forton. La vivo penetras en la foliaron de miaj pulmoj kaj reestigas ĝin. La pejzaĝo cirkulas en mia sango ; mirinda rozo kreskas en mia koro : mi dezirus dividi kun vi ĉiuj ĝian parfumon, ĝian belon. Estas necese ne kutimiĝi al tiaj spektakloj : ni atentu pri la timinda povo de la kutimo, kiu malheligas la plej ravajn pejzaĝojn, senkolorigas la tagojn, sapeas la entuziasmon, vualas la flamon de la rigardoj.

Mi ne kulpas esti feliĉa, dum aliuloj suferas pro mizero aŭ malsato : la mondo bezonas feliĉulojn, kiuj estas kvazaŭ lumturoj por la malbonŝanculoj. La ĵurnaloj prezentas al ni teruraĵojn, abomenaĵojn, katastrofojn, sed ne multe parolas pri la bonkoreco, la feliĉo de estuloj, kies okuloj radias la esperon. Tamen ili ekzistas kun sia varmeco trankviliganta. Ni ofte forgesas, ke ni portas en ni mem nian paradizon aŭ nian inferon. Kiel la floroj, ni turnu nin al la lumo...

En iuj privilegiaj situacioj (aŭskultado de muziko, legado, kontemplado de pentraĵoj, pejzaĝoj) malfermiĝas en nia kapo lukso, kiu al ni malkovrigas la stelon, la floron neniam viditajn, aŭdigas al ni ĉielan simfonion. Tiam ni spertas momentojn de intensa ĝojo, dum kiuj ni vibras kiel liro, komunikante kun la kosmo.

Jen stariĝas la rifuĝejo, inter la rokoj, ĉirkaŭita de ĉizitaj pintoj. Grandioza spektaklo, kiu nin penetras. Ni emocie eniras en la templon de la brilo : brilo kiel neĝo, glacio, kiel pureco, beleco. En tiu kristala universo, la silento estas muziko, la rigardo estas amo, la ĝojo estas ebrieco. Ni kunportos ĉe ni ĉi tiun beatecon kaj nia hejmo pro tio estos transformita, lumigita.

Ekzistas alia reĝlando, kiu radias en ni, kiu estas pli vasta ol regiono kun konataj limoj. Penetri en tiun landon, tio estas forlasi iom post iom tion, kio sufokas la personon kaj la koron, por ke malkovriĝu la nematerieco...

Sidante sur ŝtono, mi pensas pri Tibor Sekelj, kiu skribis en "Tempesto sur Akonkagvo" : "En tiu subluma momento, inter vivo kaj eterneco, miaj pensoj flugas al ĉiuj esperantistoj el la mondo. Mi hisas la verdstelan flagon per manoj tremantaj kaj kun koro tremanta."

\* \*

NIKOLIN' :

El "ALKROĈE AL LA VIVO"

Elfrancisgis : Emile Van Damme

Sin diri  
por ne plu mensogi.  
Sin diri por lerni esti libera.  
Kaj lerni sin diri  
por naskiĝi pli kaj pli libera.  
Kaj aŭdaci sin diri  
lernante scii  
ke ie  
iam  
ni suferos  
kaj ke ni ne solaj suferos.

Sin diri envere  
eble  
por lerni finfine  
kiel ami  
por lerni finfine  
respekti  
kion la vivo  
ofertas kiel movaĵojn  
kaj diferencojn

Sin diri tia kia oni sin sentas  
kaj lasi la alian sin diri  
tia kia li sin sentas  
sen krio nek juĝo  
Sin diri tutsimple  
kaj ne plu miri  
ne plu konsterniĝi  
ne plu ektimi  
antaŭ ĉies vero.  
Sin diri kun siaj deziroj  
kaj siaj rifuzoj  
kun siaj alvokoj kaj siaj kontraŭdiroj.  
Sin diri, jes,  
kaj kelkfoje nenion diri  
kaj kelkfoje kapabli diri  
ke oni bezonas silenton  
vakuon aŭ variecon,  
sen devi alvoki  
pretekstajn subtilaĵojn  
sen devi finpoluri  
beletajn mensogajn donacojn.

Sin diri finfine  
kaj ne plu mensogi.



El "Vivo antaŭen" (Life ahead)

de

KRISHNAMURTI

Ĉu ne estos granda tragedio, se vi ne malkovros por vi mem kio estas ami ? Se vi ne konas amon nun, vi neniam konos ĝin, ĉar kiam vi maljuniĝos, tio, kion oni nomas amo, iĝos malbelegaĵo - posedaĵo, ia komercaĵo por vendi kaj aĉeti. Sed se vi nun komencas havi amon en la koro, se vi amas la arbon, kiun vi plantas, la vagan beston, kiun vi karesas, tiam - plenaĝigante - vi ne restos en via malgranda ĉambro kun ĝia mallarĝa fenestro, sed vi forlasos ĝin kaj amos la tuton de vivo.

Amo estas fakta, ĝi ne estas emocia - io pri kio oni ploras. Ĝi ne estas sentimentalulo. Amo tute ne enhavas sentimentalecon. Kaj estas ege serioza kaj grava afero, ke vi konu amon dum vi estas junaj. Viaj gepatroj kaj geinstruistoj eble ne konas amon, kaj pro tio ili kreis teruran mondon, socion ĉiam batalantan kontraŭ si mem kaj kontraŭ aliaj socioj. Iliaj religioj, iliaj filozofioj kaj ideologioj ĉiuj estas falsaj, ĉar ili ne enhavas amon. Ili perceptas nur parton : ili rigardas tra mallarĝa fenestro, de kie la elrigardo povas esti agrabla kaj vasta, sed ĝi ne estas la tuta amplekso de vivo. Sen tiu sento pri intensa amo, vi neniam povos havi percepton de la tuto ; do vi ĉiam estos malfeliĉaj kaj je la fino de via vivo, vi havos nenion, krom cindro, multaj malplenaj vortoj.

\*

Mi opinias, ke estas malbena esti ambicia. Ambicio estas formo de mem-intereso, de mem-enfermiĝo kaj tial ĝi generas mens-nebonecon. Vivi en mondo, kiu estas plena je ambicio, sen esti ambicia, signifas amon por ĝi mem sen serĉi rekompencan rezulton. Kaj tio estas ege malfacila, ĉar la tuta mondo, ĉiuj viaj amikoj, konatoj, baraktas por sukcesi, por plenumiĝi, por iĝi iu grava. Sed kompreni kaj liberiĝi de ĉio ĉi, kaj fari ion, kion vi vere amas - kio ajn ĝi estas, aŭ kiel ajn modesta kaj malagnoskita - tio, laŭ mi, vekas la spiriton de grandeco, kiu neniam serĉas aprobon, rekompencan, kiu agas pro la agado mem kaj tial havas sufiĉajn fortecon kaj kapablecon por ne esti kaptata de la influo de neboneco.

## PER SATIRISTA PLUMO

Priskribi sovetian realecon oni povas diversmaniere. Tiom riĉa, tiom varia, tiom tragikomedia ĝi estas! La aŭtoro de la proponata rakonto rigardis ĝin per humurplena rigardo. Tamen lia fajna humuro ofte transformiĝas en akran satiron, kaj lia rido estas larmoplena. A. Visoĉenko verkis ĉi tiun rakonton jam estante elmigrinto kaj loĝante en Brazilo. Ĝi eniris lian libron "Laŭ ĝenerala linio", priskribantan sovetian realecon de la 30aj jaroj kaj apenaŭ kredeblajn (sed ve - vere okazintajn) zigzagojn de stalinisma "ĝenerala linio". La libro estis eldonita de ukraina eldonejo en Parizo en la 1960a jaro kaj eniris jam riĉan fonduson de ukraina elmigranta literaturo, evoluanta tra la tuta mondo malgraŭ diversspecaj baroj.

A. Visoĉenko :

### Konvena fianĉino

Kamarado Penjok estis persono sufiĉe konata, almenaŭ en limoj de grandega multetaĝa domo numero 2 en strato Pirogov en Kievo. Kaj ĉi tiu domo siatempe havis specifan destinton : en ĝi loĝis popolaj komisaroj de subsoveta Ukrainio, iliaj unuaj anstataŭuloj, gvidantoj de gravaj respublikaj institucioj, redaktoroj kaj ĉefaj kunlaborantoj de centra gazetaro. Unuvorte, ne loĝantoj, sed nur asoj kaj atutoj grupiĝis kune. Kion do diri, la menciita konstruaĵo, certe, ne egalas milojn da aliaj en ĉefurba Kievo.

Kaj imagu, kamarado Penjok estis tie sufiĉe konata persono! Kio do li estis ?

Diktatoro ! Se rigardi lin el vidpunkto de doktrino de Marks-Engels-Lenin-Stalin pri diktaturo de proletaro, nur tian respondon eblus doni je supremetita demando.

Interalie, ĉiuj asoj kaj atutoj de la domo numero 2 en strato Pirogov ŝatis diri fojfoje pri kamarado Penjok :

- Nia diktatoro!

Sed ĉi tio eldiriĝis sen ajna malamo aŭ envio, kontraŭe, ĉiam kun milda rideto, afable, pardoneme. Tio aspektis kvazaŭ ili ĉiuj nur uzis laŭvican eblecon montri sian klarecon, kaj samtempe ankaŭ konsenton kun teoriaj bazoj de marksismo-leninismo. Kiel asertas la plej famaj bolŝevikaj gvidantoj, teorio devas nepre kongrui kun la konkreta praktiko. Kaze de kamarado Penjok la afero prezentiĝis tiel :

Li centprocente apartenis al la proleta klaso. Ankoraŭ lia



avo, veninte el vilaĝo urban, komencis labori kiel kortpurigisto. Ĉi tiun profesion heredis lia filo, kaj poste, lia nepo. Do, tri generacioj de Penjok nenion propran havis, ekzistaĉis nur dank' al sia laboro ĉe sinjoroj, kaj trovis rifuĝon ja en keloj de sinjoraj palacoj.

Kiam eksplodis la revolucio, juna proletdevena nepo-kortpurigisto trovis sin inter ruĝaj partizanoj, aroge minacante la tutan mondon :

- Ni je malfeliĉo de ĉiuj burĝoj  
La mondan fajregon disblovos!\*

Tamen la "fajrego" estingiĝis en sesono de la terglobo. Kun peza kupraĵo (honora distingajo de ruĝa partizano) surbruste kamarado Penjok revenis al paca konstruado. Dum kelkaj jaroj la komunista partio praktike demonstradis per li efektivigon de siaj sloganoj : "Kiu estis nenio, iĝos ĉio" aŭ "Ĉiu kuiristino povas estri la ŝtaton".

Nia eks-heroo de la revolucio pri ĉi tiu periodo de sia vigla agado rememoris kun aparta estimo. Li diris :

- Mi estis hegemono en Oĥtirka\*\* regiono, hegemono en opereto de Sumy\*\*\*, hegemono en distrikta milico...

Multajn lokojn kaj oficejojn li nomis, kaj ĉie oni donadis al li strangan postenon de hegemono. Ĉi tiun vorton proletdevena kortpurigisto memorfiksis el paroladoj de elokventaj agitistoj dum la civila milito kaj uzis ĝin por difini ĉefon, gvidanton.

Ekde tiuj jaroj en partia dosiero de kamarado Penjok aperis maloportuna enskribo :

"Ofte falas en senliman drinkadon. Furiozas ebria".

Iom post iom la meritplena ruĝa partizano devis forlasi la ŝatatan postenon de hegemono. Ĉi tiu enskribo malamikece fosis sub liaj piedoj per nevidebla fosilo. Finfine kamarado Penjok troviĝis en domo numero 2 en strato Pirogov de urbo Kievo. Kiel ni jam scias, ĉi tie popolaj komisaroj, iliaj anstataŭuloj, altaj oficialuloj ktp. ktp. nomis lin "diktatoro". Kaj tute ne senbaze.

Li posedis nek de ŝtato donitan privatan aŭtomobilon, nek fortepianon aŭ radioricevilon, nek telefonon, nek banĉambron. Kaj, ĝenerale, lia loĝejo tute ne similis luksan apartamenton de respondeca oficialulo de sovetia ŝtato. Ĝi kaŝiĝis en duonluma kelo kaj konsistis el du ĉambretoj, dividitaj per maldika, sufiĉe

-----

\* populara revolucia kanto.

\*\* ukraina urbeto ĉe rivero Vorskla.

\*\*\* urbo en Ukrainio ĉe rivero Psel.

taŭzita kotona ŝirmilo. En ĉi tiuj ĉambretoj trovis azilon kamarado Penjok, lia edzino kaj naŭ diversaĝaj infanoj. Se iu eksterulo hazarde trafis ĉi tien, li ne tuj povis kompreni kien li trafis, ĉu banejon, ĉu kelon. Ĉi tie ĉiam pendis vapor-nuboj de ĵuslavita, propra kaj fremda, vestaĵo, kaj akra odoro el bareloj kun fermentita brasiko kaj salitaj kukumoj pinĉis la nazon.

Tamen, la popolaj komisaroj, iliaj anstataŭuloj ktp. ktp. tute ne havis bezonon veni ĉi tien por renkonti kamaradon Penjok. Li falis en ilian vidteronon kiam ili forveturadis al siaj oficejoj aŭ revenadis hejmen.

Kiel estas konate, Sovetio estas klasika lando de diktaturo de proletaro. Do, la tuta potenco en ĝi apartenas al manlaboristoj. Ĉi tion tre bone sciis teorie ĉiuj grandaj asoj en domo numero 2 en strato Pirogov. Sed, kvankam ĉiu el ili povis ekhavi kelojn nur pro portado de pezaj oraj ringoj kaj tial formale ne apartenis al kategorio de diktatoroj, tio ilin tute ne ĉagrenis. Tute kontraŭe, ĉi tiun escepte honoran, enskribitan eĉ en Konstitucio, postenon ili tute libervole fordonis al kamarado Penjok. Imagu ankaŭ, neniu el ili iam atencis lian privilegian lokon en doktrino de Marks-Engels-Lenin-Stalin!

Kie kaj kiufore aperu kamarado Penjok en domo numero 2 aŭ apud ĝi, li konstante prezentis el si oficialan personon. Blanka, verdire ne de la unua pureco, kitelo, brilanta kupra dekoraĵo surbruste, balailo kaj korbo por rubaĵoj - tiaj estas kutimaj akcesoraĵoj de kamarado Penjok.

Kiel vi vidas, li revenis sian praan kortpurigistan staton. Se nia reveninto finus almenaŭ mezan partian lernejon, li, verŝajne, turnus sin al fondinto de komunismo kun jenaj vortoj :

- Ho, granda Marks! Kia vi estis antaŭvidanta ! Vi diris, ke historio ripetiĝas kiel farso. Pura vero. Mi denove estas kortpurigisto, denove funde de la socio, sed nun super mi, en neatingebla alteco, trembrilas slogano "diktaturo de proletaro!"

Kompreneble, kamarado Penjok ĉie en domo kaj ĉirkaŭ ĝi zorgis pri pureco. Dank'al lia laboro ĉi tie regis perfekta ordo. Ĉi tion vidis kaj komprenis ĉiuj popolaj komisaroj, iliaj anstataŭuloj, direktoroj de respublikaj institucioj, redaktoroj de centraj gazetoj... Jen ili preterpasas la kortpurigiston, kaj ĉiu, konforme al sia posteno, markas renkontiĝon :

- Ha, diktatoro, saluteton! Varman saluteton, diktatoro! Al diktatoro, fortikan sanon!

Tiel kutime laŭte ekkriadis ruĝaj sinjoroj kun malgranda

ŝtata aŭ partia pezo. Pli dikaj fiŝoj eldiradis pli seke kaj kurte :  
- Bon' san', diktator'! Bon' tag', diktator' ! Salut', diktator'!

Nur popola komisaro de komuniza mastrumado, t.e. ĉefo super ĉiuj kortpurigistoj de Ukraina SSR, kamarado Meĵujev, renkontante kamaradon Penjok, ial severe kuntiradis la brovojn, kaj el lia gorgo, kvazaŭ malhelpata de enŝtopiĝinta ostoj, elpremiĝadis unusola sono :

- Ihi !

La kortpurigisto milde ridetis al ĉiuj, afable sin klinis, bondezirante, depende de horo, bonan matenon, tagon aŭ vesperon. Do, la lernejo, trairita ĉe burĝoj, bonege servis lin, tute ne vane homoj diras : "Konojn oni neniam sur dorso portas".

Kiel nomiĝas kamarado Penjok\*, tion respondecaj loĝantoj de la domo ne sciis kaj, cetere, tio ilin tute ne interesis, ili mem donis al li nomon "diktatoro", kaj tio sufiĉis. Manon al la kortpurigisto neniu etendadis, krom du tagojn jare, la Unuan de majo kaj 7-an de novembro, t.e. dum la plej grandaj sovetiaj festoj.

Ho, tiam kamarado Penjok aspektis tute aliel. Li, kiel ĉiam, aperadis unua surstrate, sed jam sen blanka kitelo, balailo kaj rubaĵkorbo. Ĉiuj vidis sur li militistan jaketon kun partizana ordeno, bluan militistan pantalonon kaj brilantajn botojn el kromita ledo. Ĉion ĉi, kvazaŭ en muzeo, nia kortpurigisto gardis ankoraŭ ekde epoko de civila milito, sed uzis ĝin nur dufoje jare.

Jen do staras la homo, levinte kapon supren, metinte unu piedon iom flanken kaj turnas sian botbekon dekstren-maldekstren por propra plezuro. Kaj al li aliras kaj aliras respondecaj loĝantoj. Ĉiu salutas lin okaze de la granda festo, solene prononcas "kamarado Penjok" sen ŝerca aldono "diktatoro" kaj etendas al li sian manon. Tamen, tio ne estas la tuta mano, sed nur du fingroj, kiujn la kortpurigisto dankeme premas. Eĉ popola komisaro Meĵujev dum ĉi tiuj tagoj aspektas aliel. Li ne rigardas kamaradon Penjok severe, same homece salutas lin okaze de la festo, sed, distinge de aliuloj, donas al li ne du, sed nur unu montrofingron, kaj eĉ tiun fleksitan. Tial por la kortpurigisto apartenas nur duonfingro de lia plej alta ĉefo en Ukrainio.

Ĝuste hodiaŭ estas tia tago. Kvazaŭ monumento, staras

-----  
\* Ĉe orientaj slavoj (belorusoj, ukrainoj, rusoj) gravas antaŭnomo, patronomo kaj familinomo de persono. Do, la "respondecaj loĝantoj" ne sciis antaŭnomon kaj patronomon de kamarado Penjok (ĝi povus esti, ekz., Ivan Petroviĉ.)

kamarado Penjok apud domo numero 2 en strato Pirogov, kaj preter li iras kaj iras asoj kaj atutoj de ĉiuj koloroj. Ĉiuj hastas al manifestacio. Per ellernita rideto respondas meritplena ruĝa partizano je iliaj salutoj, sed lia rigardo vagas alie, sur ŝtuparo, kie ĉiumomente aperas novaj kapoj.

- Nur ne preterlasi! - maltrankvile pensas li kaj daŭrigas paŝti perokule ŝtuparon de la domo.

Al ĉi tiu tago li preparis sin longe kaj atendis de ĝi tre multe. Eĉ anticipis li ellernis kurtan paroladon. Escepta okazo, kiu povus ŝanĝi sorton de tuta lia familio, trafis lin. Preterlasi ĝin estintus nepardonebla krimo.

Kaj jen ĝoje ekradiis vizaĝo de la monumento. Sur la ŝtuparo li ekvidis popolan komisaron Meĵujev, akompanatan de gaja, ruĝvanga sekretario de Kieva urba partia komitato kamarado Sapov.

Du ĉefoj proksimiĝas al li. Ili estas en bonega humoro, ili ridas, Sapov rakontas ion amuzan, faras komikajn grimacojn al sia kunparolanto.

- Ha, kamarado Penjok, - per senkolora voĉo eldiras Meĵujev - gratulojn okaze de la revolucia festo... Li apenaŭ haltas, sed sukcesas enpiki al la kortpurigisto sian festan duonfingron.

- Kamarado popola komisaro, permesu al mi diri al vi kelkajn vortojn! - decidvoĉe alparolas kamarado Penjok, tenante en mano montrofingron de la ĉefo de komuniza mastrumado de Ukrainio.

Meĵujev kaj Sapov militiste haltas, silente atendente sekvajn vortojn de rekonita reprezentanto de diktaturo de proletaro.

La lasta ne malbonuzas valoregan tempon de respondecaj personoj.

- Mi, same kiel vi, kamarado popola komisaro, verŝis mian sangon por venko de la oktobra revolucio... Mi estas membro de la partio ekde la 1917a jaro. Pli aĝaj miaj infanoj estas komsomolanoj\*, malpli aĝaj - pioniroj\*\*... Tuta mia familio estas bolŝevika centprocente...

- Ĝuste tial vi ricevis honorplenan laboron en ĉi tiu domo, rimarkas Sapov.

- Uhu! - neklare murmuris la iama ruĝa partizano kaj hastas aldoni :

- Mia filo, Peĉjo, ŝoforo de taksio, kaj via filino Halja amas unu la alian. Ili volas geedziĝi. Ili jam parolis kun mi. Mi estas por. Mi esperas, ke vi ankaŭ...

Post ĉi tiuj vortoj la popola komisaro kolere eltiris sian fingron el la mano de la kortpurigisto, turnis sin al Sapov kaj

----- \* komsomolano : ano de komsomolo (mallongigo el rusa : komunističeskij sojuz molodjoĝi - komunista unuiĝo de junularo). Oni membriĝas ekde

per rompita voĉo demandis :

- Kiel al vi ĉi tio plaĉas ?

La sekretario de Kieva urba partia komitato, severe mezurante per okuloj neatenditan svaton, fortranĉis kurtan respondon :

- Vizioj de frenezulo!

- Ĉu ci aŭdis? - jubilvoĉe ĵetis al la kortpurigisto la popola komisaro. Memorfiksu al ci por ĉiam, Meĵujev estas Meĵujev, kaj Penjok estas Penjok!

- Sed la infanoj amas sin, - ne kapitulacis la iama heroo de la revolucio.

Sapov ne ŝatis kontraŭdirojn, li tuj ekfuriozis :

- Pri la sorto de infanoj de respondecaj oficialuloj okupiĝas la partio. Ĝi kraĉas je amo. Filino de popola komisaro edziniĝos al tiu, kiu al ŝi estos decidita.

- Kaj mia filo? - konfuzite interesiĝis kamarado Penjok.

La partia sekretario denove firmvoĉe tranĉis :

- Kaj via filo veturu kolĥozon kaj trovu tie konvenan fianĉinon !

Elukrainigis **Oksana.**

-----

14-jariĝo.

\*\* pioniro : ano de porinfana komunista organizaĵo (ĝis 14-jariĝo).

\*\*\*\*\*

## MEMORE

En mia libreto "Sepdek jaroj sub la verda stelo", kiu aperis en 1980, mi nomis centon da gesamideanoj. El la tiam ankoraŭ vivantaj, multaj estas nun forpasintaj. Plej freŝdate Simone Combebias, kies nomon mi legis malĝoje en la nekrologo de "Sennaciulo" de aprilo.

Dek kvin jarojn malpli aĝa ol mi, ŝi estis ankoraŭ juna virino, kiam mi unuafoje ŝin renkontis antaŭ pli ol 30 jaroj. Mi vidis ŝin nur dufoje, poste perdis ŝin el la okuloj. Sed en mia fidela memoro konserviĝis preciza bildo : afabla beltrajta vizaĝo, tre esprimiva, rideta, eĉ ridema ; vigle moviĝema persono ; ŝia beltembra voĉo ankoraŭ sonas en miaj oreloj. Entute iu neforgesebla, se nur unu fojon renkontita.

Mi konis plurajn tiom fervorajn esperantistojn, sed pli ol ŝi, neniam. Ŝi estis neŭtrala en la plej ĝusta senco de la vorto, dumviva membro de UEA kaj ankaŭ de SAT. Certe Simone Combebias lasos bedaŭran senton kaj karan memoron en ambaŭ asocioj.

VALO

## KORESPONDĜENTOJ

*Verkado scivola kaj siniluzia  
kondukas krajonon tra blanka papero,  
sur kiun verŝiĝas la semoj, l'espero  
de amo jen proza kaj jen poezia.*

*La varmo, kortremo.  
Somero, ĝojemo.*

*Vojaĝu rapide, senpaŭze, senĉese.  
Nur ĉe ŝi vi haltu, letero, koverto.  
Kaj kiel frandaĵo aŭ dolĉa deserto  
vi logu la ŝiajn okulojn karese.*

*La grizo, kormendo.  
Aŭtuno, l'atendo.*

*La tempo lantadas donante doloron  
al mia spirito soifa je scio.  
Ĉu pravas tim' mia ? Ĉu pasis jam ĉio ?  
Ĉu min ŝi forgesi frakasas la koron ?*

*La frostoj, korrompo.  
Jen vintro, la trompo.*

*Sed iun momenton vualo forŝvebas  
dank'al dezirata alvena poŝtsendo.  
Ne plu memoreblas sufer' dum atendo ;  
nun nur legdeziro kaj amo tre strebas.*

*La floro, korskuo.  
Printempo, la ĝuo.*

*Pako la tria.*

## AL EDZO MIA

*Mi ploras nun  
ĉar mi soliĝis.  
Mi nostalgias  
pri foraj tagoj,  
kiam puraj vortoj,  
delikataj agoj  
varmigis min.*

*Mi glaciigis  
pro neĉeesto  
de sunradioj,  
kiuj estis vi !  
Vi nun vivas  
en dimensio alia.  
Ĉu vi sopiras min ?*

*Lina Trenner Gabrielli*

## PROPORCIOJ

En Parizo sin mortigis Dalida, tre fama - cetere bela kaj talenta - varie-  
tea kantistino.

Du plenaj paĝoj en ĵurnalo, unu tuta vespero en televido.

Kelkajn semajnojn antaŭe mortis Louis de Broglie, grandega sciencisto.

Kelkaj linioj en gazetoj, kelkaj vortoj en radio kaj televido.

Komparu la gloron de Coluche, talenta amuzisto kaj efika bonkorulo, kun la  
modesta famo de kiu ajn nobelpremiita fizikisto, komparu la enspezojn de rock-  
kantistoj aŭ de televid-prezentistoj kun tiuj de genia komponisto, de Sorbona  
profesoro, aŭ la salajro de lerta metiisto. Kaj konfesu, ke en niatempa konsum-  
ada socio regas stranga proporcio en la agnoskataj meritoj, stranga hierarkio  
de la valoroj. Kaj ke la socio pozicio de la homoj ofte respondas nek al iliaj  
bezonoj nek al ilia vera utileco.

Stranga socio, ja.

VALO

\*\*\*\*\*

## MORTULKANTADO

de Hyotamore el Kyrena

### Unua kanto

Vi priploras la mortintojn? Stultuloj, tiaj vi estas! Priploru  
la vivantojn, kaj diru al ili: Beataj vi estas, ĉar vi estas mortaj!

Kial vi ploras pri mortintoj? Kial? Al vi ja nenio okazis, kaj  
la mortinto ne sentas. Kial vi do ploras? Ĉar tio nenion kostas.  
Ĉar tio faras bonan impreson. Ĉar tiel estas laŭ kutimo. Ĉar  
oni tiun, kiu ne kunploras, kriĉe kalumnias sensenta kaj senkora,  
kvankam tiu verŝajne estas la plej honesta inter vi kanajloj.  
Kial vi do ploras? Ĉar vi ĵus havas kortuŝon foje sufiĉe plori  
el la plej profunda interno pri aferoj, kiuj vere priplorindas. Kaj  
nun vi faras tion dum tiu oportuna okazo, ĉar vi ne devas honti  
kaj ne devas konfesi al iu, pro kio vi vere ploras. Do, ploru  
pri la mortintoj. Hipokrituloj vi estas en ĉiu kazo! Tiel aŭ tiel!  
Nu, do ploru en la nomo de dio!

Sed mi diras al vi : Ekzistas mortintoj, kiuj pli vivas ol viv-  
antoj; kaj inter vi vivas vivantoj, kiuj jam ekde sia unua lernej-  
tago estas mortaj, kvankam ili diras al vi : "Ni vivas, ĉar ni  
havas la potencon!"

La plej riĉa inter vi ĉiuj estas la mortinto; tiu ja havas pli  
ol li bezonas : la kvieton!

Jen vidu, kiaj mizeruloj kaj kompatinduloj vi estas : Al la

mortintoj vi donas funebrajn kronojn per floroj kaj branĉoj,  
kovras ilin per valoraj vestoj, ornamas ilin per oro aŭ per  
juveloj, disponigas al ili multekostajn ĉerkojn el bonodora  
ligno aŭ arĝento, konstruas por ili firmajn kriptojn, kvankam  
ili ne frostsentas, ne malsatas kaj ne rimarkas la pluvon. Sed  
tiujn, kiuj vere malsatas kaj frostsentas kaj ŝtoniĝas antaŭ la  
ŝtormo, kiu vipas super la maro, tiujn vi senzorge lasas velki  
en mizero. Se la mortinto povus paroli al vi, certu pri tio,  
ke li dirus : "Al tiuj donu; ĉar kuvon da kalko mi preferas al  
kadavro-muziko."

Vi faras tian spektaklon kaj pompon dum la funebraj cere-  
monioj. Seriozege : Se vi celus per tio nur la mortinton, vi  
ne plu agus tiel. Efektive, ĉu vi foje rigardis la vizaĝon de  
transdorminto kun devoto? Ne, tion vi ne faris. Se vi farintus  
tion, vi envolvus la mortinton en krudan kaj malkaran tolo-  
tukon, kaj enterigus lin en proksiman kamposulkon diskrete  
kaj en nokta kvieto, sen bruo kaj sen trumpetfanfaro kaj  
tamen kun la pura kaj profunda konscio, ke vi donas al la  
mortinto la plej altan honoron. Faru tion, homoj! La mort-  
into tion dankas al vi, ĉar ĝuste **tion** ties vizaĝo esprimis.

Ĉion la mortinto jam spertis antaŭ la vivanto, eĉ la plej  
karan : la vivon.

Estu sinceraj al vi mem : Funebro estas nenio alia krom  
la aflikto pri tio, ke la mortinto sencere monie formortis  
antaŭ viaj okuloj kaj postlasis al vi la devon lamenti kaj fari  
spektaklon, nenio alia krom la ĉagreno pri tio, ke la forpas-  
into rajtas ĝoji, kiam ajn li deziras, sen devi hipokriti.

Kiom vi homoj iĝus pli sinceraj kaj honestaj, se heredaĵoj  
ne plu ekzistus!

Rilate al mia propra afero : Estas tute egale al mi, ĉu mi  
lastaspire adiaŭos min en klubfotelo aŭ sur sterkejo. Tio  
randas. Grave estas al mi, ke neniu kaj nenio ĝenos min dum  
tiu sankta faro, nek oleo, nek la ŝamano, nek la sorĉisto, nek  
la teokrato, nek la silkaj manoj de tion ĉi-atendantoj. Pro tio,  
ĉar nenio superas la turmenton, kiu devas legi en la okuloj,  
sur la lipoj, en la prezentata kaliko : Ankoraŭ momenton ĝis  
fino de l'suferoj! Jen mia senlima atestimo por la besto, kiu  
kaŝas sin, kaj kies senbruan sinkaŝadon ĉiuj aliaj bestoj res-  
pektas per tio, ke ili plu trankvile manĝas, koitas kaj amuz-  
iĝas en siaj ludoj.

La penso, ke mi ie povus revidi ĉiujn ĉi kanajlojn, kiuj ĉi

tie sur la tero sence krucigis mian vojon, instigus min mortinon.

La lasta vorto de mortinto. Ne zorgu pri ĝi kaj ne konsideru ĝin eble eĉ sankta. La lasta vorto jam ne estas ties propra; ĝi jam estas je duono la spiro el alia stato, kiu neniel koncernas vin kaj vian vivon. La lastan vorton de mortinto ĝis nun neniu komprenis. Kaj neniu aŭdis. Tamen ĝi jam naskis pli da malbono ol vortoj de vivantoj. Kaj vin detenu aŭskulti la lastan vorton de homoj, kiujn vi ŝatas kaj estimas! Ĝi povas renversi per unu silabo ties tutan vivsaĝon kaj vi restas senhelpaj. La lasta vorto de mortinto eĉ malpli gravas ol tiu de viro ekstreme ebria.

Antaŭ ol la mortinto ankoraŭ ne diris: "Fino, nun vi ĉiuj kune povas interne kaj ekstere karesi mian pu---!", ĝis tiam li ankoraŭ ne estas tutmorta kaj povas ĉiutage aperi al vi kiel fantomo. Sed, se li tion vere diris, kun certe li ne revenos al vi. Ĉar diri tion kun tia konvinko kaj tia emfazo kapablas nur iu, kiu vere ne volas plu eĉ etan rilaton al ni.

Morti por ideo aŭ por frazo aŭ por nocio, kiu ŝanĝiĝas, - kaj ĉiu nocio ŝanĝiĝas - estas absolute nenio. La grasigita bovo faras la samon, ĉar ofte ankaŭ vi kontraŭagas vian volon. La grasigita bovo ne nur faras la samon, ĝi ankaŭ kapablas al la samo. Kie mi trovu vian superecon? Kie vian gloron? Pli grave kaj pli valore, sed pro tio multe pli malfacile, estas: Resti vivanta por ideo! Komprenibile: **tion** feldkapitano ne povas ordoni, eĉ se li devenas el Kapernaŭmo. Kio do estas la plej supera? Tio, kion oni povas ordoni aŭ tio, kion oni ne povas ordoni? Decidu mem! Mi faris mian parton.

Estas tute egale al la mortinto, kial aŭ pro kio li mortis. Sed tio estas la ununura kaŭzo, kial la vivantoj unuj al la aliaj persvadas sin, ke tio ne indiferentas al la mortinto.

Kiaj mizeraj bedaŭrinduloj vi estas, ke vi ŝarĝegas la mortinton: ke tiu mortis por vi! Ĉu vi ne hontas tiamaniere malfaciligigi ties vojon al la lumplenaj, sunaj altoj? Ĉiu ja havas sufiĉe kaj supersufiĉe da problemoj pro tio, ke oni mortas sola kaj tute por si mem.

Se la mortinto, kiu por vi mortis - **vi** asertas tion, ne la mortinto - havus la kapablon ankoraŭfoje morti por vi kaj viaj ridindaj elpensadoj: estu rokfirme certigitaj, tion li ne farus. Sed homoj, kion vi tiukaze farus?

Laŭ la maniero, kiel popolo honoras kaj traktas siajn mortintojn, oni ekkonas la kulturnivelon de ĉi tiu popolo? Tute ne. Sed laŭ la maniero, kiel ĝi traktas siajn vivantojn.

La mortinto estas al vi sankta. Sankta? Se la vivanto, ĉiu vivanto al vi sanktus nur je duono tiom, vi pli proksimus al dieco.

Tuj post kiam vi ekkomprenas, ke la morto ne estas fino, sed nur stato, nur interstadio de okazaĵoj, kiujn vi precize povas observi, kiujn vi en ĉiu ekzisto-manifestado per viaj propraj okuloj povas ekkoni, tiam sur la tero ne plu ekzistos sklavo. Memkompreneble ankaŭ ne mastroj. La dioj antaŭe forvojaĝis.

Laŭso, kiu forlasas la korpon de mortinto, por serĉi al si alian paŝtejon, pli valoras kaj pli diecas ol la mortinto. Agu laŭ tiu koncepto kaj vi neniam plu intermilitos.

Se la mortinto post tritaga mortestado ankoraŭ nur parolus unu vorton: Via mondo detruigis, kaj pli bela aperus al vi! Pli bela, ĉar ĝi estus konstruita surbaze de vero kaj sincero kaj vi devus infere obei al ĝi, por ricevi rekompencan por viaj bonaj faroj.

Pro tio, ke la mortinto post sia lasta korbato ne plu povas elblovi la kvar literojn "f", "i", "n", "o", tial eblas regi la mondon per stulteco. Kaj ĝuste nur tial oni povas regi ĝin.

Estu kun plena amo al la **vivantoj**, la mortintoj ja neniel donas ion por tio. Ili plu ne povas komerci helpe de via amo kaj plu ne spici supon.

Parolu pri vivantoj bonintence. Pri la mortintoj vi ne devas paroli bone; ili ne plu defendas sin. Kaj tio povas nek utili nek damaĝi al ili.

Ju malpli vi zorgas pri la mortinto, des pli tiu dankas al vi. Provu tion! La pleja feliĉo de la mortinto estas ja la ekzisto en kvieto sen vi.

### Lasta kanto

Patrino! Vi ploras pri via mortinta filo? Tion vi diras. Vi ploras pri vi, ĉar li lasis vin pluvivi sola. Do, egoismo. Kaj egoismo estas homeca kaj klarigebla kaj komprenbla, sed nobla ĝi ne estas. Kaj tial mi nek povas honorati nek laŭdi vian doloron. Pro tio ne koleru al mi. **Vi** misuzis la nociojn, ne mi. Sed: Mi ankoraŭ ne estis patrino, kaj silentas.

(El "Der Ziegelbrenner", Kajer 3, 16a de marto 1918) **B. Traven**

Tradukis: Tarsen Regis

## Pri Louis Couturat

En la unua volumo de sia aŭtobiografio (p.169 de la franc-lingva eldono, Stock, 1968), Bertrand RUSSELL dediĉis paĝon al Louis Couturat, la fama idisto. Jen ekstrakto :

"Pri la jaro 1897 mi konservis tre malmultajn rememorojn, krom tiu pri la publikigo de miaj "Fundamentoj de geometrio". Mi memoras ankaŭ pri la ĝojo, kiun donis al mi laŭdan leteron de Louis Couturat, kun kiu mi ankoraŭ ne havis personajn kontaktojn, sed kies verkon "Matematika Infinito" mi recenzis por revuo. Mi ĉiam deziris ricevi el eksterlando laŭdajn leterojn kaj tiu revo estis realiganta la unuan fojon. Couturat rakontis al mi, kiel li elturniĝis en mia verkaĵo, "armite per vortaro", ĉar li konis eĉ ne unu anglan vorton. Iom poste, mi vizitis lin en Caen, kie li tiam estis profesoro. Surprizis lin mia juneco, sed tio ne malhelpis inter ni naskiĝon de amikeco, kiu daŭris ĝis la tago, kiam kamiono rulpremegis lin dum la mobilizado de 1914. Dum la lastaj jaroj mi perdis kontakton kun li, ĉar tute absorbis lin la problemo de internacia lingvo. Li subtenis Ido-n kontraŭ Esperanto. Liadire, ekzistis en la tuta historio de la homa specio nenij homoj pli malvirtegaj ol la esperantistoj. Li priploris, ke la vorto Ido ne taŭgas por formi vorton similan al "esperantisto". Mi proponis "idioto", kio ŝajne ne multe plaĉis al li..."

Krom tiu ĉi anekdoto, B. Russell skribis, i.a., ke Louis Couturat estis arda subtenanto de liaj ideoj pri la matematika logiko kaj ke lia ĉefa verko estis tio, kion li skribis pri la logiko de Leibniz. Laŭ B. Russell, Louis Couturat havis la meriton elarkivigi kiel la unua kaj konigi la plej bonajn inter la ankoraŭ ne eldonitaj manuskriptoj, kiujn lasis Leibniz post sia morto.

Kribo

-----  
La sprito de Boris VIAN :

- \* Oni komencas rikolti malfeliĉojn, kiam oni ĉesas pensi pri si.
- \* Dezerto estas la nura afero detruenda per konstruado.
- \* Mi opinias, ke mi malpli kostis al Francio ol Napoleono ; kaj tamen li estas multe pli fama ol mi.
- \* Endas ĉiam vidi la bonan flankon de la aferoj.  
- Konsentite, returniĝu!

## La lignoĉevalo

Kutime mi ja ne skribas rakontojn. Por diri la veron : unue mi tute ne havas tempon por tia lukso, kaj due mia ortografio tiel erarriĉas, ke mi preskaŭ malesperas, se ni skribas kontroltekston en la lernejo. Jen sento, kvazaŭ zigzagus tranĉilo en mia ventro. Tiam miaj oreloj ĉiam fajre ruĝiĝas kaj mia kapo zumas kiel kaputa komputero. Jen sento, kvazaŭ la fia sorĉistino tuj metos en la bakforon min.

Sed momenton, ĉiuj maŝinoj stop!! Vi ja tute ne konas min ĝis nun. Mia nomo estas Unjo. Mi havas precize dek jarojn, sekve ankoraŭ frekventas la lernejon, do mi estas knabino, kiu antaŭ ĉio devas lerni - kiel mia patro diras - kaj kiu almenaŭ emu al danko, ke neniu ĝenas sin ĉe la plej granda plezuro en la mondo, ĉe la lernado, kiu fojefoje pensu ankaŭ pri tio, ke multaj plenkreskuloj devas labori, por ke la infanoj povu ĝui tian sennuban feliĉon. Nu, li iom troigas fojefoje. Ĉu mi do ne helpas hejme per aĉetoj ktp, ĉu mi do ne helpas al la olda virino en nia domo? Ĉu mi do ne alportas la manĝon por la kolomboj de nia libertempa rondo "Junaj naturesploristoj" ? Konsentite, la plenkreskuloj laboras por ni, sed ankaŭ ni, la lernantoj, sufiĉe ŝvitas. La opinioj de Paĉjo fojefoje dubindas. Hieraŭ mi hejmenportis bedaŭrinde jam la trian "nesufiĉa" pro mia katastrofa ortografio. Anstataŭ koleri, li gratulis al mi pro mia eksterordinara atingiĝo, kaj petis, ke mi baldaŭ denove feliĉigu lin per simila heroaĵo. Kion oni pensu pri tio ?

Sed nun plu en la teksto. Kvankam mi fakte ne ŝatas la skribadon, mi volas rakonti al vi la sekvan travivaĵon, ĉar mi trovas, ke endas rakonti ĝin, ĉar ĝi tiom freneze strangas. Ĉu vi jam iam vidis parolantan lignoĉevalon? Mi efektive vidis tian. Sed ĉiuj maŝinoj stop!!!, pri tio nur pli poste.

Komenciĝis per tio, ke mi intencis forlogi Paĉjon de la skribtablo. Li sidas ja pli ol sufiĉe ĉe la skribtablo, tumultas per la skribmaŝino kaj plenigas dikajn kajerojn. Tion, kion mi skribas dum jaro, li skribas facile dum semajno. Nu, kaj ofte li legas en miaj libroj. Tiam li ĝuste legis en la libro de Karl May "La trezoro en la arĝenta lago". Mi do volis forlogi lin de tiu libro, por ke mi poste povu kaŝi ĝin en mia ĉambro. Mi ne komprenas, kial la plenkreskaj devas legi indianajn rakontojn?

Mi diris do al li : "Kara Paĉjo, kion vi opinias pri tio, se ni refoje entreprenos promenon? Ili starigis en la parko ludejo

amazon da lignaj bestoj. Vi ne povas imagi kiel belegaj ili estas! Testudo, kamelo kun tri ĝiboj, krokodilo, serpento, leono, hipopotamo kaj multaj pliaj bestoj. La hipopotamo tiom vaste malfermas la buŝon, ke oni povas facile loki sin inter la dentojn eĉ sidante kiel tajloro, jes ja imagu Paĉjo, kiel tajloro!"

"Ĉu vere? Eĉ kiel tajloro, nekredeble! Eble eĉ mi mem povus povus provi sidiĝi tie, kiel vi pensas pri tio, Unjo?" respondis Paĉjo.

"Nu", mi diris, "ĉu vi sukcesos, ĉu ne, mi ne scias. Por tio oni bezonas atletan korpon, sed ni ja tamen povos provi. En kazo de bezono mi ŝovos vin, konsentite?"

"Bone, Unjo, vi persvadis min, mi kunvenos", diris Paĉjo kaj salte leviĝis.

Kiam li eniris la banejon, mi kaŝis rapide la libron, kaj poste ni ekmarŝis. Mi iris vestite per mia mirinde bela ruĝa jupo kun la blankaj punktoj, kiu plej bone harmoniis kun la somera vetero, kaj kiu jam pro tio pleje plaĉas al mi, ĉar jam Patrino sin vestis per ĝi. Aldone mi surmetis la flavan bluzon. Patro kompreneble protestis: "Vi aspektas kiel la klaŭno Buntkaĉ". Kompreneble mi defendis min: "Mi ne aspektas kiel la klaŭno Buntkaĉ, sed kiel Unjo, sinjora moŝto lia ekselenco la patro!"

Estis posttagmeze, la suno ĵetis siajn orajn fadenojn al ni, kaj la ŝafaj nuboj naĝis kontente dormante en la vasta lazura ĉielo. Mi iris dekstre, kaj mia barbe ornamita patro maldekstre. Mi ja plej volonte tuj denove ekgakintus kiel kompanio de anseroj, sed tamen ne faris tion, ĉar mi tre ĝentilas.

Post kvin minutoj ni jam enestis en la parko, kaj tie ni ekkuris por atingi kiel eble plej rapide la ludejon. Patro mia tiurilate ĉiam havas gravan avantaĝon. Ĉiam, se li faras paŝon, mi devas fari du paŝojn. Kiam ni alvenis, mi enspiris profunde kelkajn fojojn. Kaj poste mi saltis senhezite sur la testudon, kiu ĝuste liberis. Vi devas scii, ke la ludejo tre similis al jarfoirplaco. Zumis tie de la multaj infanoj kiel en abelujo. Ĉiuj volis rajdi sur la lignobestoj, kaj ĉiuj en la sama tempo! Elprovinde la kokon, la serpenton, la trigĭban kamelon, la krokodilon kaj la ĝirafon - la surgrimpado de ĝirafoj postulas akrobatajn kapablojn! - ni iris al la hipopotamo.

Mi diris al Paĉjo: "Nu, nun ni foje vidu, kiu el ni sukcesos pri la tajlor-sido en la buŝo." Mi grimpis inter la dentojn kaj leĝere krucumis la krurojn. Estis ja klare, kion mi iam jam sukcese faris, tion mi povas fari ankaŭ plian fojon. Kiam Patro estis en la vico, li baraktis pro honto: "Ne, tio nun ne eblas, imagu la multajn infanojn, la gepatrojn, kion ili pensu pri mi?"

Unjo, ne, mi tre petas vin..." Mi senkompatis: "Sed vi promesis ĝin, Paĉjo!" Ĉu li havis fuĝŝancon? Tute ne. Kvankam li ekŝvitis pro honto, li devis fari la komplezon al mi. Estis antaŭvideble, ke tio ne funkciis ĉe li. Kiam li firmpinĉigis sian supran korpduonon inter la dentoj, la infanoj ĉirkaŭ ni laŭte ekridis. Estis malice, sed ankaŭ mi kunridis. Patro sakris kaj kriis: "Vi jam ricevos vian rekompenccon!" Kiam li fine barakte elturnis sin, mi forkuris kiel paskleporo, por fuĝi lian venĝon. La plej minimuma, kio atendis min, estis, ke li tiros je miaj oreloj. Jen mi devas atenti. Ĉe la dekstra orelo mi sensivas, ĉar ĝi ne tre sanas.

Ĉe la ĉevalo li atingis min kaj ĝuste intencis mankapti al mi, kiam subite la ĉevalo diris: "Ho ve!", ĉar mi senintence tretis sur piedon de ĝi. Kiam mi komencis kompreni la surprizon, mi tretis ankoraŭfoje la ĉevalon por eltrovi, ĉu mi ne eble vere false aŭdis. La ĉevalo vokis nun eĉ pli laŭte: "Ho ve!"

Patro paliĝis: "Unjo, ĉu la ĉevalo vere diris: 'Ho ve'?"

"Jes, la ĉevalo diris 'Ho ve!' respondis nun la ĉevalo antaŭ ol mi. Jen mi vere perpleksiĝis.

"Jes ja, Patro, la ĉevalo parolas", mi kriĉis terurite.

Paĉjo tre serioziĝis kaj iris atente ĉirkaŭ la ĉevalon, palpatis la beston kaj flustris al mi kiel en kriminalfilmo: "Eble ie tie troviĝas laŭparolilo aŭ kasedregistraĵo."

Sed tie nenio estis, nek kablo, nek aparato, nek io. Karaj legantoj, imagu bone, parolanta ĉevalo, besto tia, kia ĝi kutime aperas nur en fabeloj! Ĉu vi povas imagi kiel mi tremis!?

La ĉevalo henis pro plezuro pri niaj ŝafaj vizaĝoj. Kaj kiam ĝi parolis sufiĉe ligne, sed tamen atakeme: "Vi certe pensas, ke nur vi povas paroli, kvankam mi lernis paroli jam antaŭ unu jaro, kiam mi ankoraŭ troviĝis en la metiejo de nia kreinto! Tiu cetere eĉ ne iomete miris, kiam ni petis lin, ke li nin paroligu. Kaj vi, vi gapas kiel novenaskitaj beboj. Mi ja konsentas, ke mi parolas ankoraŭ iom ligne, sed tio estas nur afero pri tempo, ĝis mi parolos pli bone ol vi. Vi homoj parolas jam de jarmiloj, kaj tamen, kiom da banalaĵoj vi babilaĉas! Ĉu ne vere?"

"Kial banalaĵoj?", mi interrompis ofendite.

"Vi tretas seninterrompe sur miajn piedojn kaj spite tion miras, ke mi krias 'ho ve!' Sed mi diras al vi, se vi tiel plu krimos, jen mi plendos ĉe la krokodilo, por ke ĝi foje mordu vin en vian postfaĵon."

"Momenton, momenton, ĉevalo, tiel rapide ne", rediris Patro, "ne tiel haste, verda ĉevaleto! Se vi denuncos nin ĉe

via ĉefkrokodilo-ĉionvorulo, jen ni forsegos viajn du orelojn, por ke vi neniam denove denuncu iun. Prefere diru kiel okazis, ke la lignobestoj lastatempe lernis la paroladon, por ke ni komprenu pli bone vin. Ni diras kiel proverbon : 'Stulta kiel ŝtupo!' Sed tio ja nun ne plu pravas, se mi ne eraras."

La ĉevalo moke rigardis nin kaj tiam diris : "Ja, tio tre simplas. Tiel longe, kiel ni ne havis propran lingvon, ni lignobestoj neniel povis komprenigi nin reciproke. Ni silentis kiel fiŝoj kaj ne havis eĉ nur ŝanceton en la batalo kontraŭ la superregado de la homoj. Estas ja tiele : Se oni intencas unuigi kontraŭ kiu ajn, necesas povis paroli kun la propra partio, ĉu ne? Kiam ni ankoraŭ silentis, ĉar ni ne povis esprimi niajn ideojn, ĉiu povis rajdi kaj treti kaj turmenti nin, tute laŭplaĉe. Nu, sed tio nun ja ŝanĝiĝos! Pri tio sankte fidu, vi barbaroj, kiuj vi estas!"

"Tute ne barbaroj! Ni ja ne sciis, ke vi tiel delikatsentas, ĉiamverda nobloĉevalo. Kutime la lignobestoj ja silentas kaj ne tuj krias, se iu tretas ilin, ĉu mi ne pravas?" mi respondis nun tamen iom pli laŭte ol mi intencis.

"Kutime, kutime" indignis la ĉevalo, "kaj la nekutima, he, pri tio vi estas sen ideo, tio ne estas la kampo via, ĉu ? Mi nun volas foje malkaŝi ion al vi. La problemo enestas en tio, ke vi mem tro kutimas, pli bone tro ordinaras. Jen la kaŭzo, kial vi tiel senkomprene algapis min!"

Mi jam antaŭen saltontis por vangofrapi la impertinentan ĉevalon, sed antaŭe Patro retenis min kaj diris ridete al mi : "He, Unjo, bridu vin, la ĉevalo - ĉe la avino de l'diablo - tute pravas. Kien ni fine venus, se ni fidus nur pri tio, kio jam ekzistas, kio jam kutimas? La homaro ne plu farus eĉ nur paŝeton antaŭen, por ĉiam kaj eterne nenio nova sub la suno okazus! Ni estus la sklavoj de la nuno!"

Fininte la etan paroladon, li denove ridis kaj mankaresis la ĉevaldorson. Kion diri kontraŭ li? Tre verŝajne li pravas. La ĉevalo henis konsente kaj eĉ kapjesis iomete.

Mi diris ĝentile al la ĉevalo, ke mi pripensos ĝiajn vortojn, kaj tiam ni adiaŭis de ĝi. Ni promesis, ke ni denove venos por viziti ĝin. Ni iris hejmen kaj survoje mi havis la ideon nepre surskribi la tuton.

Patrinjo malŝate kapneis kaj diris, ke ni elpensu je la venonta fojo ion pli bonan. "Vere", ŝi diris, "la parolantaj ĉevaloj jam ekzistas en la lasta vojaĝo de Gulivero, kaj ĉe la antikvaj grekoj parolis ĉiu dua ĉevalo, se mi bone memoras."

Nu, tio ne estas justa, tio ja ne estas pruvo por tio, ke ne tiel okazis. Mi ja vidis la ĉevalon per miaj propraj okuloj...

H.H.

## POR NIAJ INFANOJ (Al la gepatroj...)

Gastono

Mi havas opinion ke, krom maloftaj esceptoj, la gepatroj ne kapablas bone taksi la sentojn kaj kapablojn de siaj infanoj, ĉar ofte infanoj timas riproĉojn aŭ primokojn kaj silentas pri siaj propraj sentoj antaŭ familianoj.

Mi memoras, ke foje mia patrino diris al mia instruisto : "Mi timas, ke li ne estas sufiĉe elturniĝema!" Kaj li respondis : "Kontraŭe, mi timas, ke li estas tro elturniĝema!" Fakte ambaŭ eraris, ĉar mi sukcesis mezbone trapasi mian vivon ĝis nun, neniam profitante de la aliuloj.

Mi havis amikon, kiu estis direktoro de hotelo kaj infandomo en la montoj de Valkluzo. Dum la libertempo, ofte mi promenis kun grupeto de 8 infanoj elektitaj post interkonsento. Ĝenerale ili estis inter 7 kaj 13-jaraĝaj.

Mi alkutimigis ilin konsideri, ke ni estas socia grupo, kvazaŭ samfamilia, ekde la unua tago. Ili bone komprenis tion kaj la plej fortaj aŭ plej aĝaj bone helpis la aliajn anstataŭ plendi ke ili estas ĝenantoj. Sed por bone sukcesi, necesas plena agado de la gvidanto, kiu devas vidi kaj aŭdi ĉion, interveni, nur kiam necese, nur por helpi, ne por esti ĝenanto, kaj dum la paŭzoj, kiam la konversacio falis, necesis trovi anekdotojn, rakontojn, ludojn ktp.

Mi multe aŭdis ilin paroli pri siaj gepatroj kaj pri aliaj plenkreskuloj, aŭ prave, aŭ erare, kaj kiam mi havis okazon, en la hotelo, paroli kun tiuj plenkreskuloj, mi povis konstati gravajn diferencojn de penso pri samaj faktoj.

Tio kondukas min al jenaj rimarkoj :

1 - La infanoj, eĉ tre junaj, havas senton pri egaleco : ili ne ŝatas, kiam oni preferas alian ol ilin mem. Ekzemple, al knabo, kiu ne bone zorgas pri ludilo, kaj kiu agas kvazaŭ li ne plu ŝatus tiun ludilon, oni ne devas diri al li : "Tiu ĉi ludilo ne plu plaĉas al ci, mi donos ĝin al cia kuzo!" Sed diru : "Ci devus doni ĝin al cia kuzo kaj mi aĉetos alian por ci... kiam mi havos sufiĉe da mono!" Tiam la infano pli bone komprenas la valoron de sia ludilo, libere decidus pri la ago doni, ne riskos esti ĵaluza pro la transdono.

2 - La multekostaj ludoj ne estas la plej ŝatataj de la infanoj. Mi memoras pri knabineto, kiu havis nur rompitan pupinon, sen kapo, sen brakoj. Amika najbarino iom pli aĝa faris



kapon por ĝi per ĉifonoj kaj vestis ĝin per aliaj eluzitaĵoj. Post kelkaj monatoj, ŝi ricevis de la urbo belan pupinon. La knabino rigardis ĝin kaj metis ĝin apud la malpuran. La patrino prenis la malnovan kaj enterigis ĝin ĉe la fundo de la ĝardeno. Post la vespermanĝo la knabineto eliris kaj, per siaj fingretoj kaj bastoneto, elterigis la malnovan ludilon, por ke ĝi ne malvarmiĝu dum la nokto!

Por mi, la plej taŭga ludilo estis fosilo por fari truojn. Tiu manio akompanis min dum la tuta vivo. Ankoraŭ nun, kiam mi vidas truon, mi alproksimiĝas por vidi la ecaron de la grundo!

3 - Tre gravas ne mensogi al infanoj, aŭ antaŭ ili, se oni ne volas, ke ili estu same mensogantoj.

4 - Kiam ili faras demandojn, necesas ĉiam respondi al ili afable kaj kiel eble plej facile kompreneble por ili (laŭ la aĝo).

Infano, kiu ne havas taŭgan respondon de siaj gepatroj, direktiĝos al aliaj personoj, eble malbone elektitaj.

5 - Libereco estas necesa, sed oni devas ĉiam esti preta interveni kiam necesas. Tiuj intervenoj ne devas esti tro oftaj, kaj esti akompanataj de klarigoj, por ke la infano havu impreson, ke oni helpas al ĝi, ne ke oni ĝenas ties liberecon.

6 - Ofte oni erare opinias, ke la infanoj naskiĝas bonaj aŭ malbonaj, kapablaj aŭ ne kapablaj. Plej ofte ĉe ili estas ekvilibro. La vivo, la medio influas ilin, sed kiam ili havas fortan personecon, videble aŭ kaŝe, ili reagis nur pro kontraŭema mensostato.

Se mi uzas mian personan ekzemplon : mi neniam fumis, ĉar mia patro estis fumanto ; mi ne iras al kafejo, ĉar dum longa tempo mi loĝis antaŭ kafejo, kaj de mia fenestro mi vidis la defalon de la drinkuloj.

Konklude kaj sekve de tiuj rimarkoj, gravas kompreni, ke infano havas jam propran personecon, ke ni devas helpi ties disvolviĝon, nur reagi kontraŭ danĝeraj tendencoj. Pro tio necesas sin kompreni por kompreni al ĝi kio estas libereco kaj kie troviĝas ties limoj.

Ofte infanoj samtempe ŝatas fikciajn kaj raciajn rakontojn, sed ni agu racie antaŭ ili. Jam la lingvoj estas plenaj je malraciaĵoj "pro kutimo" ; kiam ili rimarkas, ke oni agas malracie, ili ne plu komprenas kaj ne plu sekvas nian instruadon.

Mi ofte aŭdas plenkreskulojn plendi pri la sinteno de la infanoj kaj de la gejunuloj. Ili ne konscias, ke ni ĉiuj respondecas pri la nuna stato, eĉ simpla preterpasanto, kiu ĵetas mal-

purajn sur la trotuaron : de malpuraĵo al vandalismo, la paŝo estas rapide transirata! Gejunuloj, kiuj ne ankoraŭ pagas impostojn, ne konscias, ke baldaŭ ankaŭ ili devos pagi pro la vandalismo, ĉar malofte la kulpantoj mem pagas.

En **Sennaciulo** mi ĵus legis alvokon de la PK pritrakti la temon "Estonta ĝenerala agadpolitiko de SAT". Mi ne ŝatas la vorton "politiko". Mi lernis Esperanton por faligi barilojn kiuj apartigas la homojn, sed mi rapide konstatis, ke aliaj bariloj estis starigitaj de la doktrinoj, dogmoj, rasismoj, ksenofobioj ktp. Mi esperas, ke ni restos eksterdogma asocio kun eduka celo strebanta malaperigi ĉiuspecajn barilojn starigitajn de la potencaj "ismoj".

Iu el la lasta, "elitismo", jam gajnas terenon ĉe kelkaj esperantistoj, kiuj opinias, ke propagandi la lingvon en malkleraj kaj malriĉaj medioj (enmigrintoj, ekzemple) estus perdita tempo kaj riskus aldoni "balaston" al niaj movadoj. Ili ne konscias, ke multaj el la infanoj de tiuj enmigrintoj estos baldaŭ bonaj lernantoj, kiuj direktiĝos al la angla, ĉar ili ne scias, ke Esperanto ekzistas kaj oni enŝovas en iliajn kapojn, ke en Usono ili povus havi pli bonan vivon (eble erare). Aliaj, kiuj restos malkleraj, mem izoliĝos en specoj de novaj gettoj, kaj ni revenos al la stato priskribita de Zamenhof, kiam li parolis pri sia juneco.

Infanoj ne devas esti viktimoj de la malestimo, kiu iam okazis inter iliaj gepatroj. La malsamaj kutimoj ne devas esti obstakloj al kunlaborado. Ambaŭflanke necesas fari paŝon.

Bone estas agi kontraŭ la landlimoj, sed antaŭe necesas elradikigi el niaj mensoj ĉiujn "ismojn", kiuj celas apartigi la homojn. Ĉiu kapablas kleriĝi, malrapide ĉe la komenco, pli rapide kiam la baza instruo estas sufiĉe forta.

Malgraŭ la aserto de kelkaj gekamaradoj, ke la gejunuloj ne plu interesiĝas pri ideologio (verŝajne partiema ideologio), mi opinias, ke multegaj el ili esperantistiĝus, se ili havus la certecon, ke niaj movadoj neniam al iu ajn "ismo" ligiĝos!

**Gastono, 5.3.87**

*Boris Vian : Por certigi sin, ke oni ronkas, eĉ se oni estas sola, sufiĉas ekdormi en loko, kie estas eĥo, kaj vekigi sufiĉe rapide por aŭdi la eĥon de la ronkado.*

Pripensoj pri "amo" kaj revirtiĝo de iuj artiŝokkorul(in)oj.

Eble jam okazis al vi ricevi de iu, kiu antaŭe am- kaj amor-frenezis por (laŭ siaj propraj asertoj...) kaj kun vi, tian "noton":  
" (...)mi scias, ke mi ne plu kapablas helpi, feliĉigi vin ; nek vi min. (...) Mi estas feliĉa, trankvila. La kialoj ne koncernas vin - prefere mi diru : ne koncernu vin. Mi ŝatus, ke vi trovu samajn feliĉon, trankvilon, sed tio povas veni nur de en vi mem. Amikoj helpas sed nur en ni mem troviĝas la fonto de feliĉo kaj trankvilo."

Bele, ĉu ne? Aŭ vomige, laŭopinie... Saĝeco post diboĉo; eventuale, utera trankviliĝo post menopauzaj ekscitiĝoj, aŭ vira rekviŝo post la mezaĝa seksa revigliĝo; oni konas la kanzonon.


Strange, tamen: tiajn deklarojn vi ricevas neniam dum la koncerna homo bezonas vin, afektive, sekse, anime (!!), sed ĉiam nur poste, t.e. kiam, satiginte el via plena, sincera, (stulta!) memdonemo, li/ŝi ree sentas mirigan interesiĝon, sindonemon, eĉ re"amon" (re-!!), por ĝuste tiu edzlin)o, pri kiu li/ŝi tiel vigle, ploraĉe, akre iam plendis, nur tiom, kiom tio necesis por akiri konsolon en viaj brakoj (bv. noti la eŭfemismon). Aŭ ili trovas novan "fratan animon" (re-re-!! baldaŭ ne plu funkcios mia tajpmaŝina ironisignilo...) - sed ne kuraĝas tion diri. Ho hipokriteco...

Kaj tiaspecaj ne-plu-amantoj (de vi!) nun moralumaĉas, aŭ fiuzas torditajn pseŭdopsikanalizajn argumentojn, ekzemple : mi nun trovas feliĉon en mi mem, mi estas "aŭtonoma", ktp.; kaj ĝuste ili akuzas vin je... divenu?...je egoismo... Amuze, ĉu ne?

Nu, kial do ili ne estis tiel "aŭtonomaj", kiam ili bezonis viajn karesojn, viajn seksajn kontaktojn, viajn kisojn, vian amon, kaj efektive ĝuante ilin, ankaŭ tiam estis "feliĉaj"? Supozeble, intertempe okazis interesa evoluo de la vortsigniĝoj - aŭ estas mi, kiu plene idiotas.

Sed, bast kaj fi, ne indas uzi pli da inko por tiaj homoj (ĉu vere, "homoj"?): kiel ili kapablas esti tiel malhonestaj al si mem, kaj al tiuj, kiuj vere amis kaj plu amas ilin - kaj elteni bildon de si mem ne naŭziĝante? Fugiĝante kaj detruante la objekton de sia iama amo (tielnomita), ili fakte fuĝas sin mem, sian propran nelojalecon. Ne, do, respektante sin mem, ili meritas nur prisputaĉon.

Vera Sinort



## PRI MONDSOCIALISMO

(Vd. L! 70)

La propono de Mondsocialisma Partio priskribas la nuran eblecon ŝanĝi la nunan aĉan homsocion, kies maljusteco, kru-eleco, malfrateco, malamikeco estas "virtoj" de tiu Besto, kiu fieras pri sia "rimarkinda" cerbo.

Tia propono estas liberecana kaj dum jarcento liberecanoj strebis al ĝia realigo ; parenteze, en Hispanio, ĝi efektiviĝis dum la hispana revolucio, sed, kiel nuntempe, la superreg-antaj minoritatoj bremsis tiun aspiron, helpate de la etprofit-antoj, kiuj konsideras nur sian nunan profiton kaj ne imagas alian homsocion, fratecan, ĉar ofte ili ne interesiĝas pri la evoluo de l'Homaro. Ankaŭ Esperanto estas bremsita.

Tial la plimulto nenion scias pri tio kaj plu baraktas en tiu malhumana socio. Taŭge informite, la plejmulto strebos al la efektivigo de tiu propono.

Ŝajnas al mi, ke la administracia parto de tiu teksto estas ne tiom ellaborita kiom tiu de la liberecana propono.

Suzanne

## ANKORAŬFOJE PRI LA ĈAPELITAJ LITEROJ

En la lastaj numeroj de **Laŭte!** aperis artikoletoj pri la ĉapelitaj literoj kun diversaj proponoj. Kial tiom da reform-memuloj? Antaŭ sufiĉe da jaroj mi lernis francan lingvon. Tiu ĉi lingvo havas tri malsamajn grafikajn akcentojn, nome : ^ kaj neniuj el la 30 gelernantoj, kiuj ĉeestis la kurson, iam proponis ŝanĝojn en la franca alfabeto.

Nu, nia lingvo ne bezonas ŝanĝojn, ĉar ĉio jam troviĝas en ĝi danke al la genio de nia kara Majstro.

Tio, kio sekvas, estas skribita sen ĉapelitaj literoj kaj akorde al la Fundamento de nia lingvo. Bonvolu legi, mi petegas.

\*

Ekde la unuaj balbutadoj de nia lingvo multaj samideanoj plendis pri la chapelitaj literoj; sed la genia Zamenhof, jam en la jaro 1888-a donis al ni la solvon; kaj jen kion li, interalie, skribis chi-rilate en **Lingvaj Respondoj** :

"Multaj plendas, ke la skribado per ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ estas por ili neoportunaj kaj malhelpas ilin ankau en la presado de verketoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun la signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la **Aldono al la Dua Libro** : anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraghi uzadi la literon h kaj anstataŭ ŭ - simplan u."

Kaj la Akademio de Esperanto, preskau unu jarcenton poste - oktobro de 1980-a - faris deklaron chi-respekte, el kie mi ekstraktas jenon :

"Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldonighas samloke jena rimarko : 'Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u' ".

Gesamideanoj : ne perdu vian tempon nek elspezu viajn fort-ojn pensante en nova alfabeto por nia lingvo; kuraghu uzadi ch, gh, hh (litero ĥ estas arkaismo en nia lingvo), jh, sh kaj u.

Do, afablajn salutojn al chiuj lautuloj, al klasikuloj kaj al reformemuloj.

**A. Lopez Luna**

### **ALDONOJ al "KIO ESTAS INSTRUA"**

Mi petas korekti proprajn nomojn en mia artikolo "Kio estas instrua" (L! n-ro 71, p.61) : ne Maroto, sed Martov, ne Pobresov, sed Potresov.

#### **1. Du konataj figuroj de menŝevismo**

Martov (pseudonimo de Cederbaum Julij Iosipoviĉ) estis tre konata figuro de menŝevismo (oni eĉ ne povis forpeli lian nomon el sovetiaj lernolibroj). Li estis unu el fondintoj de peterburga organizaĵo "Unuiĝo por batalo por liberigo de laborista klaso" (1895), ankaŭ li eniris redaktan komitaton de fama revolucia ĵurnalo "Iskra" ("Fajrero"). Ĉi tiu ĵurnalo aperadis ekde 1900a ĝis 1905a jaroj (en Lejpcigo, poste : Munkeno, Londono, Genevo) kaj per nelegalaj vojoj atingadis la carisman Rusujon. Post skismo en la 1903a jaro (la Dua kongreso de Rusia social-demokratia laborista partio - mallonge : RSDLP) Lenin eliris el redakta komitato de "Iskra" kaj ĝi iĝis ĉeforgano de menŝevikoj. Mortis Martov en emigracio (kie? mi ne scias) en la 1923a jaro.

Potresov (Starover Aleksandr Miĥajloviĉ) estis same konata gvidanto de menŝevikoj. Dum la Dua kongreso de RSDLP li kune kun Martov kaj Trockij kontraŭstaris proponojn de Lenin

pri la partia statuto. Mortis ankaŭ en emigracio (kie?) en la 1934a jaro.

#### **2. Obsedaj pensoj kaj komparoj**

Rilate eserinon Kaplan. Estante en lernejo (kaj mi ja finis sovetian lernejon) min kaj miajn samklasanojn multe interesis sorto de Kaplan, sed nia profesoro pri historio nenion kapablis respondi. Multege da diversspecaj versioj pri ŝia sorto vagadas tra Sovetio! La plej sovetiisme ekzaltitaj personoj (feliĉe, ili ne abundas), aŭdante nomon Kaplan, komencas krii, ke oni devis ŝin diŝiri, mortbati per ŝtonoj, bruligi viva ktp. (kion ilia sadismema fantazio al ili sugestas). Aliaj diradas : ne, tute kontraŭe, oni devis lasi ŝin vivi - ŝi vivu, pentu kaj ekkonsciu kiom grandegan krimon ŝi faris - la plej grandan krimon dum la tuta historio de homaro! Adeptoj de ĉi tiu versio rakontos al vi ke, efektive, ĝuste tiel okazis : ŝi restis viva kaj Lenin persone vizitis ŝin por interparoli. Inter dekoj da fantaziaj versioj apenaŭ eblas ekscii veron.

Sed jen proksimiĝas 70-jariĝo de t.n. "Granda Oktobra socialisma revolucio" kaj la sovetia gazetaro revokas la "gloran vojon de bolŝevikoj". Ekzistas tia revuo "Sputnik", prezentanta el si kompilon de sovetia gazetaro kaj destinata por eksterlanda publiko (do, kompreneble, ĝi ekzistas ankaŭ franclingve, kaj ĉiu franco povas libere ĝin aboni). Nu, ke ĝi celas eksterlandanojn, tion montras ĝia luksa aspekto kaj bela finna papero (ja ĝi aperas en Finnlando). Sed ne ĉi tiuj detaloj gravas. Mi malkovras februaran numeron de la 1987-a jaro kaj legas tie artikolon de Boris Krotkov "Rusio estos socialisma!", inter alie (post priskribo de atenco kontraŭ Lenin) :

"Mi kredas, ke estas momento levi vualon el demando pri teroro. Ne, ne estas bolŝevikoj, ne estas la soveta potenco, kiu ĝin komencis. Estas la kontraŭrevolucio, kiu ekpafis la unua, la respubliko devis nur defendi sin.

Teroristino Kaplan estis unu el la unuaj punitoj. Ŝi estis mortpafita de komandanto de Kremlo persone. La revolucio devas scipovi sin defendi. Ĉi tio estas ne nur ĝia rajto, sed ankaŭ ĝia devo, aliel ĝi nenion validas".

Do jen kiel : komandanto de Kremlo persone! Tio, verŝajne, estis konsiderata kiel plej alta honorigo por li!

Mi pensas, ke mi ne devas klarigi al laŭtuloj kruelaĵojn de carisma reĝimo kaj neceson de ĝia ŝanĝo je demokratia sistemo. Tamen, mi ne povas ne pensi ĉi-momente pri alia teroristo, Aleksandro Uljanov (pli aĝa frato de Lenin), ekzekutita en majo 1887 pro atenco kontraŭ caro Aleksandro la Tria

(parto de la lasta rusa caro Nikolao la Dua), okazinta en marto 1887 (Vladimir Uljanov estis tiam 17-jara). Kaj tamen en ĉi tiu malhumana carisma socio okazis almenaŭ proceso de teroristoj antaŭ ilia kondamno je morto... Kaj cetere, neniu tuŝis familion Uljanov, ĉar tiam ankoraŭ ne ekzistis barbara koncepto de "kolektiva respondeco", kiun reinventis bolŝevikoj kaj Stalin amase ekstermis milojn da familioj pro "krimo" de unusola familiano. Ĉi tiu barbara koncepto plu validas en Sovetio kaj oni persekutas infanojn pro gepatroj, gepatrojn pro infanoj k.s.

### 3. Deleĝitaro de la Dua kongreso de sovetoj.

Unue, mi diru : por tiom grandega lando 649 deleĝitoj estas mizera kvanto. Laŭ mia persona opinio, elektita registaro ne estis legitima. Se interesas vin politika divido de deleĝitaro: bolŝevikoj - 390, eseroj - 160, menŝevikoj - 72, internaciistoj - 6, unuigintaj internaciistoj - 14, krome ĉeestis 7 membroj de ukraina partio de socialistoj-revoluciuloj.

Oksana.

P.S. Bonvolu korekti en "Ankoraŭfoje pri kelkaj absurdaĵoj" : p.45 : Ĉingiz Ajtmatov (li estas talenta verkisto, aŭtoro de multaj romanoj; eble, iam ankaŭ esperantistoj povos konatiĝi kun lia verkaro...)

p.46 : "... kio provokas defendan reagon ĉe subpremataj kaj malestimataj nacioj - ilian naciismon (ne rasismon).

En lasta alineo :

"... per rekono ke li, aliulo,... rajtas esti tio, kio li estas;" Dankon!

### ANKORAŬ PRI LA ĈAPELITAJ LITEROJ DE ESP-O

Jam de kelka tempo daŭras en L!, kaj verŝajne en aliaj E-gazetoj, diskuto, preskaŭ disputo pri la ĉapelitaj literoj de Esperanto, pro ke tiuj ĉapeloj ne ekzistas en la anglaj skribmaŝinoj. Tio ankaŭ ne taŭgas por la komputiloj, kio lastatempe aperis ne tute vera : komputilo glutas kion oni metas en ĝin. Cetere tio estus negado pri ebleco de komputiloj en Sovetio, en Japanujo aŭ en Ĉinio, kies skribmanieroj ne uzas latinliterojn. Oni bone memoras ke Zamenhof mem antaŭvidis la skribmaŝinan malfacilaĵon en la komenco de la lingvo-historio, kaj proponis uzi digramojn per aldonlitero **h** post la senĉapeligita litero. Tiu surogato restis kvazaŭ neuzita, eble ĉar ĝi povis naski kelkfoje kaprompajn monstrojn, kiel shanghighema, sharghajh-acho, vojhegho, ghoghghora, eĉ dubsencajn kiel machavo, pashavo, kruchonto, plachalto, jughordo (mac-havo aŭ maĉ-avo,

pas-havo aŭ paŝ-avo, kruc-honto aŭ kruĉ-onto, plac-halto aŭ plaĉ-alto, jug-hordo aŭ juĝ-ordo) aŭ eĉ ankoraŭ pli malbone : kachisto...

Plie, tiu kutimalpreno estus detruinta unu specifon de Esperanto kaj la genian sintezan solvon de Zamenhof fronte al la tre malsamaj manieroj skribi la respondajn sonojn en multaj lingvoj uzantaj la latinan alfabeton...

Venis al mi en la kapo, se entute estas problemo, la simpla ideo, ke ĉiuj skribmaŝinoj nepre posedas signojn por "citi, doni proporcion, apostrofi, interpunkti, parentezi..."

Ili estas :

, ; : ! " ' ( - \_ ) / °  
1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12

Mi proponas, ke oni uzu unu el tiuj signoj per surskribado. Mi provis tion kaj donas ĉi-poste mian vicpreferon ; la unua estas la preferata. Tio evitus la enmikson de fremdaj literoj allaseblan laŭ mi nur por matematiko.

9, 11, 7, 10, 12, 5, 6.

Jen nun kelkaj ekzemploj de uzado de tiuj signoj, laŭ la ĵuse supra ordigo :

serĉi	serĉi	serĉi	serĉi	serĉi	serĉi	serĉi	serĉi
manĝi	manĝi	manĝi	manĝi	manĝi	manĝi	manĝi	manĝi
jaĥto	jaĥto	jaĥto	jaĥto	jaĥto	jaĥto	jaĥto	jaĥto
forĵeti	forĵeti	forĵeti	forĵeti	forĵeti	forĵeti	forĵeti	forĵeti
priŝerci	priŝerci	priŝerci	priŝerci	priŝerci	priŝerci	priŝerci	priŝerci
laŭdu	laŭdu	laŭdu	laŭdu	laŭdu	laŭdu	laŭdu	laŭdu

Nun ni devas atendi la juĝon de la anglo-lingvanoj, preĝante ke fine la Esperantaj popoloj venos al konsento,

tamen!...

**J. MANCEAU**

Noto de la red. : Dum la tajpado de la tabelo "Julia" tute freneziĝis. Ŝajnas, ke almenaŭ ŝia stomako ne facile digestas la aferon...

### KIE ESTAS LA ABSURDAĴOJ ? Respondo al OKSANA (L! n-ro 71)

Jes ja, ni francoj konfuzas naciecon, ŝtatanecon, ktp. Fakte por ni tio ne gravas, mi provos klarigi kial.

Kiam ni francoj alvenis en Germanio dum la milito, sur ĉiuj formularoj estis presita : Staatangehörigkeit, kaj Volksangehörigkeit ; tio signifas : ŝtataneco kaj popolaneco, aŭ nacieco laŭ via terminologio. Kaj mi konfesas, ke tio mirigis min kaj konfuzigis min. Mi pensis, ke Volksangehörigkeit estas eufemismo por rasaneco. Mi respondis al ambaŭ demandoj :

"franca". Kion mi povus respondi, fakte mi estas franco, nur franco. Mi naskiĝis en Parizo, mia patrino naskiĝis en Parizo kaj mia patro en Châlons sur Marne. Ĝis tiam estas simple, sed jam ekde miaj geavoj estas iom pli komplike. Miaj patraj geavoj estas ambau el Ĉampanio. Mia patrino avo estas el Aŭvernio, natura filo de servistino, laŭdire gravedigita de sia mastro. Mia patrino avino estas el la regiono de Nevers, ambaŭ renkontiĝis en Parizo en la jaroj 1880-aj. Tio estas tipa kazo de milionoj da francoj. Plie mi aldonos, ke mia nomo estas "Dequaire", kiu havas nenian signifon en la franca lingvo dum en germana lingvo "Decker" signifas domkovristo. De tia punkto ĝis la konkludo ke kelkaj el miaj prapatroj estis Germanoj, kiuj venis en Francion antaŭ pli-malpli longa tempo, estas nur unu paŝo. Verŝajne tiuj prapatroj ne sciis skribi, kaj kiam ili sciis ili francigis la skribon de la nomo. Kia estas mia popolaneco ? miaj radikoj, kiel oni diras nune ? Male, miaj patrinaj geavoj havis tre francajn nomojn : Gerbe kaj Brossier, kiuj indikas nenian bretonan aŭ aŭvernian originojn. Mi daŭrigas, mi edziĝis al malagaŝino (loĝantino de Madagaskaro), mia filino estas mestiza, ŝi edziniĝis al pura malagaŝo. Kia estos la popolaneco de miaj genepoj, se ili naskiĝos ? Ambaŭ geedzoj vivas en Francio, kaj havas francan ŝtatanecon, sufiĉas, ĉu ne ?

Via ekzemplo pri Rusa Imperio, nun Sovetunio, kiu estas tre naciista, ne estas la plej trafa. Vidu Usonon : vi havas la plej ampleksan mikŝadon de popoloj el tutmondo. Vi havas mestizojn de ĉiuj eŭropaj, afrikaj kaj aziaj landoj. Ankaŭ ĉi tie, en pretermara franca departemento Reunio, estis nenia loĝanto en 1642, kiam alvenis el Madagaskaro la unuaj Francoj kaj Malagaŝoj kune, kaj poste estis mestizoj. Poste alvenis aliaj Francoj, Malagaŝoj, Komoranoj, Mozambikoj, Hindoj, Ĉinoj, ktp. kaj ĉiuj popoloj tra la jarcentoj intermiksiĝis. Kompreneble estas ankoraŭ puraj Ĉinoj, inter la Hindoj puraj Tamuloj, Guĝeratoj ktp. Ĉiuj havas francan ŝtatanecon, aŭ civitanecon. Estas same en Maŭricio.

Kiu scias kiuj estis liaj prapatroj antaŭ 2000 aŭ 10 000 jaroj? El kia mestizado li aŭ ŝi venas? Mi ne volas insisti, ĉar mi povus ankoraŭ nigriĝi multajn paĝojn tiele, ekzemple pri popolizado de Aŭstralio. Mi havas maŭrician amikon, kiu migris kun sia familio en Aŭstralion antaŭ 20 jaroj. La plej juna filo ne plu parolas francan lingvon, li estis apenaŭ kvinjara, kiam li forlasis Maŭricion, kaj li parolas nur aŭstralian anglan (tre mal-similan al Londona). Kia estas la popolaneco de la filo, se oni

scias, ke lia patro estas nepo de Hindo de Pondiŝerio ?

Por sennaciisto, la homoj apartenas zoologie al la speco Homo sapiens, kia ajn estus la haŭtkoloro aŭ alia karaktero. La genetikistoj pruvis, ke ne ekzistas raso, estas artefarita koncepto senbiologia bazo. La homoj havas la saman fiziologion, la saman patologion, ankaŭ la saman mensan potencon, ĉar kompreneble civilizacio ne enpenetris la mondon sampaŝe. Do ŝtataneco estas fakto, naciismo aŭ popolaneco estas iluzio.

Pri la lingvoj, sufiĉas ke la registaroj enkonduku Esperanton en la lernejojn, kaj post 40 jaroj ĝi estus adoptita de la plejmulto el la regatoj. Aliaj tempoj, aliaj moroj, ni ne plu estas en Mezepoko aŭ ŝtonepoko. Ni estas en civilizacio, kie la komunikado estas nepre necesa. Morgaŭ estos granda evoluo scienca, teknika kaj ekonomia komparebla al la okazo de Renesanca epoko. Ĉu vi opinias, ke la nuna ekonomia ĥaoso povus daŭri ĉiame, dum centjaroj ? La mondo estas dividita inter progresemaĵoj kaj malprogresemaĵoj, sed pro la daŭra progreso de la sciencoj kaj teknikoj, la progresemaĵoj triumfos, ne post 100 jaroj, sed baldaŭ, evoluo akceliĝas nune. Eĉ se ni ne vidus tiun novan epokon, niaj gefiloj vidos ĝin. Pasinto estas pasinto, baldaŭ niaj gefiloj ne plu atentus pri nacioj, raso, la modo estos for. Jam kelkaj homoj laboras tutmonde por tutmondaj organizoj, kiel : Organizo pri terkultivado kaj nutraĵo (F.A.O.), Organizo pri Tutmonda sano (O.M.S.), Organizo pri Scienco kaj Kulturo (UNESKO) ktp.... Ne estas revo! La estonto estas por mikŝita mondo kiel en Usono, Brazilo, Reunio, ktp... "Mestizigu vin" oni povas legi sur T-ĉemizoj de junuloj.

**DECKER.**

## ATEISTA ĈINO PRI RELIGIOJ

Sciĝas, ke religioj estiĝis de prae senkonaj homoj, sed ili akompanas historion de iuj nacioj por miloj da jaroj kaj enpenetras profunde ties animon, fariĝinte eĉ esencon de ties klasika kulturo, ekz. en Eŭropo.

Surface, simile ankaŭ en Japanio, ne estis tia religio kia en Eŭropo. Fakte tie restis/as io, kvankam ne portanta la substantivon "religio", tamen rolanta pli potence sur tieaj popoloj.

Nur en la lastaj kvin jarcentoj la eŭropanoj scienciĝas kaj la ĉinoj nur de la fino de la lasta jarcento. Sciencaj malkovroj rivelis unu post unu misterojn de la universo kaj kune presigitajn ingrediencojn en la religioj, ĝuste al kiuj pafas sagojn

ateistoj, plej akre marksistoj. Tamen ne estas sukceso eĉ eblo ekstermi religiemon el animo de la popoloj, eĉ en landoj kie marksistoj diktaturas, ĉar nedisegeble kunvivas kun honesta vivo espero kaj konsolo, ne grave ĉu ili estas sciencecaj aŭ ne.

Ekde 1949 ellernejoj sciigas nenion ol la marksisman maksimumon "Religioj estas opio de la popoloj". Sed multangule perceptiĝas odoro de religio : iuj oldulinoj kaŝeme abstinis de viando, incensas kaj litanias en la unua kaj dekkvina tagoj de la luna kalendaro. En legeblaj klasikaj romanoj kaj laŭ ili produktitaj filmoj kaj TV-dramoj videblas multaj budaistoj kaj nemultaj -inoj, kiu ankaŭ tre pake restas en orname rare restintaj budatemploj. Ili vivas askete sen amo, kio tolereblas kaj imiteblas nur de tre pokaj homoj.

Tie ĉi vivas ankaŭ milionoj da huj-oj islamkredantaj, sed krom pri porkaĵo kaj sen samnacie kompaktaĵoj loĝejoj dum fastado kaj kultado ili vivmanieras simile al la majoritata nacio han-o. Eĉ antaŭ la fondiĝo de la kompartia Ĉinio, ili ne sekvis Koranon edzinigi kvar virinojn kaj ilin vuali.

La malplej facile kontaktebla estas Kristanismo. Pro ke historie ĝiaj misiistoj devenis ĉefe de eksaj koloniistpotencoj, marksistoj ĉiam ilin surgluas per etikedo "pioniroj de okcidentaj koloniistoj" kaj post sia potenciĝo ĝin nuligis krom kelkloke, multaj kredintoj forfuĝis por eviti persekuton. Kompreneble post 1978 la situacio malseverigis iomete sed proksimiĝi al ĝi restas kuraĝobezone.

Tamen ne eblas obstakli al oni kompreni ĝian esencon. Kvankam jam ne troveblas Biblio, ne malheleblas de ia ajn ismo radioj de la klasika kaj moderna literaturo naskita el la kristanismo ĉe eŭropgrundo. Unu pieceto, unu anekdoto, fulmas en la animo de alimondaj pensemoj. Ekzemple, el la antaŭa edzino kaj ŝia divorco de la tiama plej potenca Napoleono koneblas granda egaleco de tiu mondo. Eĉ la kruelaĵoj kontraŭ Bruno, Koperniko kaj Galilejo estas nenio kompare kun tiuj de la orientaj imperiestroj, kiuj leĝere mortigis ĉiun sian kontraŭulon, eĉ nur se sia nervoza dubo, nemalofte altrangulojn. Tiuj kruelaĵoj kaŭzis multnombrajn ribelojn kaj internajn batalojn kaj ofte falon de la dinastioj. Se estis estunta iomete spirita brido de ia racia religio kia Kristanismo sur tiuj orientaj potenculoj!

Facile respondi : kiu el tiuj grandaj religioj estas la plej racia ? el kies aero oni vivas plej komforte kaj kreeme ?

Se ne estus tiom da minacoj kun aŭ sen formo, nepre kristaniĝus multe pli da personoj de ekster la kristanisma mondo, inter kiuj trea parto ne pro kredi ĝian science neek-

zistantan Dion, sed por kunsenti ĝian racion kaj envivi ĝian etoson.

La nesciencaĵoj en Kristanismo estu kiel la ĉapeloj de Esperanto kaj tolereblu! Kun espero kaj konsolo oni ĉiam sin kunligas al ia kredaĵo - religio aŭ ismo. Plej preferindas Kristanismo kaj Esperantismo (ili intermikseblas, ankaŭ sennaciismo).

S. SUK

\*\*\*\*\*

## Grava alvoko al solidareco de la esperantistoj

*Stariĝas asocio, kiu nomiĝas "PARADIZO TUJ". La celo de tiu asocio estas organizi staĝojn, seminariojn, manifestaciojn, precipe por infanoj kaj gejunuloj pri ekologio, komuna kunvivado, pacismo ktp... La prizorganto estas nia kamarado René DAMARIN, Le Barbut, F 33850 LEOGNAN, Francio, kiu jam disponas domon ĉe kamparo. Urĝe, granda sumo estas necesa por ekipi kaj organizi la bienon. Esperanto estas kaj estos uzata. La ĝirondia Esperanto-Grupo aprobas tiun iniciaton subtenatan de niaj kamaradoj Rolando Levreaud, Leo Robert, Ivo Peyraut kaj Bernardo Schneider. Bonvolu sendi viajn kontribuojn al :*

*Léo Robert, 11 rue des Frères-Lumière, F 33150 CENON, Francio - Poŝtkonto : 1217 50 F Bordeaux.*

\*\*\*\*\*

## ESPERANTA PERIGORDA GRUPO

La Grupo provis havi iom da aktiveco dum tiu ĉi jubilea jaro. La kurso plu daŭras, sed la neregula ĉeesto de la lernantoj kreas malfacilaĵojn. Ni partoprenis la du staĝojn en ARTIGUES, kiuj estis profitdonaj. La grupo akceptis en Perigozo la biciklantojn irantajn al Varsovio. Ni petis de la diversaj urbkonsilantaroj (Perigozo kaj ĉirkaŭaĵoj) doni al strato aŭ placo la nomon de D-ro Zamenhof, sed ĝis nun neniu respondo pozitiva aŭ negativa. Ni partoprenis plurajn elsendojn ĉe lokaj radioj kaj aperigis artikolojn pri Esp. en lokaj gazetoj. La grupo projektas organizi ekspozicion kaj publikan kunvenon sendube en la monato oktobro.

Adreso de la grupo : Groupe Espérantiste Périgourdin, 32 rue Paul Dumas, F 24000 PERIGUEUX, tel: 53 08 68 11

Kursoj : ĉiun merkredon je la 20a30 : Centre Socio-culturel de Trélissac. La kurso funkcias laŭ la lernjaro.

\*\*\*\*\*

## NOVAĴOJ ĈE SAT-BROŜURSERVO

\*\*\*\*\*

### "LETEROJ DE E.LANTI" reeldonita !

Dank'al antaŭmendoj de la fervora peranto de SAT (kaj nun ankaŭ de L!) en Japanio, kdo TUBOTA kôki, de SAT-centro kaj de la libroservo de SAT-Amikaro (kdo B. Schneider), aperas nun reldono de la libro "Leteroj de E.Lanti" (la originala eldono surhavas la mencion "1940"). Pro la neebleco fotokopii sur ofsetplatoj la tuta teksto estis retajpita, kelkaj preseraroj korektitaj (kaj kelkaj novaj tajperaroj aldonitaj... ni ne fanfaronu!) kaj jen denove disponebla tiu ĉi ĉiam leginda verko, ĝuste 50 jarojn post la elŝipiĝo de Lanti en Japanion - kvazaŭ kroma jubile-okazo, ĉu ne ?

Pri kio temas en tiu ĉi libro ? Nu, ne kalkulu kun mi por taŭĝe "recenzi" tian verkon! Ĝi entenas tiom da temoj, ke la kompilintoj starigis enhavtabelon kaj konsilas al la leganto elekti mem "laŭ sia humoro, intereso pri la temo aŭ eĉ laŭ la hazardo" inter, ekzemple : "Kulto al kadavroj - Moralo kaj historia materialismo - Budaismo - Japanaj virinoj - Konscienco kaj perĉiarimedeco - Sennaciismo - Judismo - Kantismo-diismo - Rabelezo kaj herezo ..." ktp, kc.

"Leteroj de Lanti" apartenas al la malmultaj originalaj E-verkoj, kiujn nepre devas legi - eĉ se per kritikaj okuloj - ĉiu interesato pri la historio de la **vivanta** Esperanto. En sia antaŭparolo G. Waringhien konfesas, ke "al Lanti mi ŝuldas la senton pri ties vivanteco" (de Esperanto). La nuna reldonanto trovis mem grandan egoistan ĝuon, retajpante tekstojn, kiuj nutris lian legavidon kaj pripensemon antaŭ jam pli ol kvaron-jarcento.

Kiuj ne posedas la unuan eldonon, aŭ perdis ĝin, aŭ deziras donaci al konato, atentu! La eldonkvanto estas limigita je 650. 300 ekzempleroj estas dissendotaj al Japanio, SAT-sidejo disvendos 100, B. Schneider 50. SAT-Broŝurservo aŭtomate liveros la libron al siaj abonantoj, kiuj ne estos informintaj, ke ili ne deziras ĝin. Do, post nelonge restos nur malmultaj dekoj da ekzempleroj. Prefere mendu tuj al la de vi elektota liveranto. "Leteroj de E.Lanti" estas 244-paĝa. Ĝia prezo : 45 FF plus afranko. Niaj japanaj amikoj sin turnu al la nova adreso de : TUBOTA kôki, Higasimikuni 3-9-12-816, Yodogawa-ku, Oosaka-si (532). Ĝis 87.12.31 ili ne pagos la afrankon kaj ricevos la libron rekte el SAT-Broŝurservo. Post 87.12.31, ili aldonu la afrankon kaj ricevos la libron fare de kdo TUBOTA.

(daŭrigo p.62)

Antaŭ dek jaroj mortis...

JACQUES PRÉVERT

### MATENMANĜO

Li metis la kafon  
En la tason  
Li metis la lakton  
En la tason da kafo  
Li metis la sukeron  
En la laktokafon  
Per la kulereto  
Li kirlis  
Li trinkis la laktokafon  
Kaj li remetis la tason  
Sen paroli al mi  
Li ekbruligis  
Cigaredon  
Li faris rondojn  
Per la fumo  
Li metis la cindrojn  
En la cindrujon  
Sen paroli al mi  
Sen rigardi min  
Li ekstaris  
Li metis  
Sian ĉapelon sur sian kapon  
Li metis  
Sian pluvmantelon  
Ĉar pluvis  
Kaj li foriris  
Sub la pluvo  
Sen unu parolo  
Sen rigardi min  
Kaj mi, mi prenis  
Mian kapon en mia mano  
Kaj mi ploris.

### ĈE LA FLORISTINO

Virino eniras al floristino  
kaj elektas florojn  
La floristino envolvas la florojn  
la viro metas la manon en sian  
poŝon  
por serĉi la monon  
la monon por pagi la florojn  
sed li metas samtempe  
subite  
la manon sur sian koron  
kaj li falas  
  
Samtempe kiam li falas  
la mono ruliĝas teren  
kaj poste la floroj falas  
samtempe kiel la viro  
samtempe kiel la mono  
kaj la floristino restas tie  
kun la mono kiu ruliĝas  
kun la floroj kiuj difektiĝas  
kun la viro kiu mortas  
kompreneble ĉio tio estas  
tre trista  
kaj necesas ke ŝi faru ion  
la floristino  
sed ŝi ne scias kiel fari  
ŝi ne scias  
per kiu flanko komenci  
  
Estas tiom da aferoj por fari  
kun tiu viro kiu mortas  
tiu floroj kiuj difektiĝas  
kaj tiu mono  
tiu mono kiu ruliĝas  
kiu ne ĉesas ruliĝi.

Jacques PRÉVERT (1900-1977)

(el la franca : Daniel Luez)

P.S. Notindas, ke eblas legi la ne malpli interesajn leterojn de Lanti verkitajn post 1937, en la broŝuro "El Verkoj de Lanti - 3a volumo" (VL.3), plu disponebla ĉe SAT-BS.

"**ESPRIMARO FRANCA-ESPERANTA**" de L. Bourgois : Jam en aprilo enmondigis la libro anoncita en L! 71. Kelkaj francaj BS-abonantoj povis ricevi ĝin okaze de la kongreso en Vaison-la-Romaine. Kelkaj aliaj aĉetis ĝin tie. Intertempe, dank'al kontrolado fare de amiko Valo kaj de la aŭtoro, starigis listo de aldonendaĵoj. (Verdire, tia kompilaĵo neniam estos definitive kompleta. Nacilingvaj esprimoj arkaikigas, eksmodigas... Novaj aperas... "Esprimaro F/E" arigas ja nur la plej firme "instalitajn"...)

Se vi jam posedas "FE" kaj ne ricevas kun tiu ĉi L! la aldonotajn paĝojn, bonvolu ilin peti de SAT-BS.

Se vi ankoraŭ ne posedas ĝin... Nu :

- Unu ekzemplero kostas 45 FF + afranko (10,30 laŭ la nuna tarifo)
- Se vi mendos samtempe almenaŭ 3 ekzemplerojn, profitu 20-procentan rabaton kaj ne pagu la afrankon (do ŝparu ĉ. 30%)

Kribo

\*\*\*\*\*

Al gelaŭtuloj, longan vivon! Jen tiucele kelkaj konsiloj, kiujn la aŭtoro espereble aplikadas jam de jarcento. La red. opinias ilin ne tre trudaj. Tio almenaŭ ne povas malutili, ĉu ?

Dek konsiloj por vivi longtempe  
de D-ro D. Davies, gerontologo en Londono

1. Plu laboru post la emeritiĝo.
2. Trovu por vi interesajn hobiajn por plu funkciigi vian cerbon.
3. Ne parolu pri maljuneco. Evitu tiujn, kiujn ĝi deprimas.
4. Malmulte drinku kaj malmulte fumu.
5. Ofte dormu samtempe kiel la suno.
6. Evitu ĉiun specon de streso. Se vi loĝas en ekscitegata urbego, travivu la streĉon kiel ludon, kunlaboru kun ĝi.
7. Ne havu zorgojn pro via idaro.
8. Marŝu almenaŭ du kilometrojn ĉiutage. Ankaŭ ĝardenado estas bonega okupo.
9. Manĝu kiel eble plej malmulte.
10. Manĝu, laŭeble, krudajn nutraĵojn kaj ne tro da transformitaj.

Ĵus aperis

ĉe Cercle espérantiste de l'Agenais

F 47340 Laroque Timbaut

# esprimaro

## FRANCA ESPERANTA

de

Lucien BOURGOIS

dorsflanke : specimenaj paĝoj

### Recenzo de VALO :

"Unu el la ĉefaj malfacilaĵoj renkontataj en la tradukado de nacilingvaj tekstoj konsistas el tiuj kutimaj esprimoj, ĉu beletraj, ĉu popolaj aŭ trivialaj, kiuj svarmas en ĉiu vivanta lingvo.

Por elturniĝi el tiu malfacilo ni disponas modelojn trov-eblajn en la verkoj de Zamenhof, interalie la nemalhavebla **Proverbaro**, kaj de aliaj bonaj aŭtoroj, kaj la didaktikajn librojn de Faulhaber : **Ne tiel, sed tiel ĉi**, de Lentaigne : **Kiel diri...? kaj Tiel diru !**

Krome, ni franclingvaj esperantistoj estas aparte favorataj. Koncerne vortojn, ja mankas al ni tiu Granda Vortaro Franca-Esperanta, kiu esperinde iam ekzistos simetrie al la **Grand Dictionnaire Esperanto-Français** de Waringhien. Sed pri la idiotismaj esprimoj la manko estas nun forigita per la freŝdataj verkoj de L. Bourgois :

**Proverbaro Franca-Esperanta**

**Laŭ la fluo de l'interparolo**

kaj, laste, sed ne lastranga,

**Esprimaro Franca-Esperanta,**



- 266 bonne presse (avoir)  
**esti bonfama**
- 267 bonnes affaires (faire de)  
**fari bonan negocon**
- 268 bonnes mains (être entre)  
**esti en la ĝusta mano**
- 269 bonne volonté (de)  
**bonvola**
- 270 bon pas (d'un)  
**rapidpaŝe**
- 271 fam. : bon poil (de) voir : 262  
- il n'est pas de bon poil!  
**li estas en acida humoro! z**
- 272 bon ton (de)  
**laŭmoda**
- 273 bon vieux temps (dans le)  
**en la bona malnova tempo z**
- 274 bon vivant (un)  
**bonvivanto, gajvivulo**
- 275 bord à bord  
**ĝisrande**
- 276 bord de l'abîme/ du gouffre (être au)  
**esti sur la rando de l'abismo**
- 277 bord de la tombe (être au) voir : 3132
- 278 bosser comme un chef  
**majstre labori**
- 279 botte (être sous la), être sous le joug  
**esti sub ies ŝuo/jugo**
- 280 botter le derrière/les fesses/le train  
**botbati (draŝi) la postajon**
- 281 bouc émissaire (le)  
**la propeka kapro z, la pek-porta kapro**
- 282 bouché à l'émeri  
**mense ŝtopita, obstrukcita** (Raymond Schwartz)  
- il est bouché à l'émeri  
**li estas balbutulo rilate al komprenpovo**

- 283 bouche à oreille (de)  
**de buŝ-al-orelo, buŝorele**
- 284 bouche bée  
**kun malfermita buŝo**
- 285 bouche en coeur (faire la)  
**afekti karpobuŝeton, afablafekti**
- 286 bouche en cul de poule (une)  
**o-forma buŝeto**
- 286\* boucher les oreilles (se)  
**kovri al si la orelojn**
- 287 boucher un coin (en)  
**mirsilentigi**
- 288 bouche sucrée (une)  
**sukeraĵamanto**  
- fig. : - c'est une bouche sucrée  
**li parolas farisee**
- 289 boucler (la)  
**rigli (ŝlosi) la buŝon**
- 290 boucler le budget  
**ekvilibrigi en- kaj elspezojn**
- 291 bouffer à en crever  
**mangĝi ĝis krevo**
- 292 bouffer comme un cochon  
**mangĝi kiel porko**
- 293 bouffer du curé  
**esti pastromalama, ne toleri pastrojn/klerikojn**
- 294 bouffer du lion  
- il a bouffé du lion  
**li furiozas kiel leono**
- 295 bouffer (manger) le nez (se)  
**malkonkordi, malpaci**
- 296 bouffi d'orgueil  
**plenblovita je orgojlo**
- 297 bougeotte (avoir la)  
**vagemi**

en kiu kunlaboris André Gilles kaj Georges Lagrange. El miloj, eble dekmiloj da tiaj esprimoj, ĝi prezentas 3777 en facile konsultebla alfabeto ordo.

Por traduki esprimon estas tri eblaj formuloj :

- 1 - serĉi sub la supraĵa formo la fundan sencon, kaj ĝin logike traduki.
- 2 - Se temas pri elvokiva metaforo facile interpretebla, ĝin traduki laŭvorte.
- 3 - Uzi similan samsignifan metaforon.

La tri estas diverse aplikitaj, mi ne citos ekzemplojn, ĉiu facile eltrovos ilin.

Al la du lastaj kategorioj apartenas multaj el la esperantaj esprimoj ĉerpitaj el la verkoj de L.L.Zamenhof, Leono Zamenhof, Kabe, Raymond Schwartz, Roger Bernard kaj kelkaj aliaj.

La tuto konsistigas altvaloran kontribuon al pliriĉigo de nia juna lingvo en la ĉiutaga uzado, kaj nutrado, per tradiciaj akiroj de la naciaj kulturoj, de la frue formiĝanta tutmonda kulturo esprimata en nia internacilingva literaturo. Pri tiu ĉi grava kontribuo ni ŝuldas dankon al L. Bourgois kaj al liaj kunlaborantoj. Ilia verko ne estas tralegenda kiel romano, de la unua ĝis la lasta linio ; sed ĉiu, kiu volas esperantigi francajn tekstojn, ĝin tenadu ĉiam preta sub la kubuto."

(El "SAT-Amikaro")

**Esprimaro Franca-Esperanta** (L.Bourgois), 240 paĝoj, 45 FF  
(Por almenaŭ 3-ekzemplera mendo vi ĝuos 20%-rabaton kaj ne pagos la afrankon)

**Proverbaro Franca-Esperanta + Esprimoj sankciitaj de l'uzado**  
(L. Bourgois), 68 paĝoj, 12 FF.

**Laŭ la fluo de l'interparolo** (konversacia gvidlibro Franca-Esperanta) 96 paĝoj A6, 8 FF.

**Kiel diri...?** praktika E-frazeologio, 5000 esprimoj, 25 FF.  
(Por almenaŭ 5-ekzemplera mendo vi ĝuos 20%-rabaton kaj ne pagos la afrankon)

**Tiel diru!** (fr./Esp.), komplemento de **Kiel diri...?** por franclingvanoj, 126 paĝoj, 20 FF (Por 5-ekzemplera mendo, 20%-rabato kaj nepagenda afranko)

Multaj aliaj verkoj estas disponeblaj... Mendu al :

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut.

Poŝtkonto samadresa : 3371 74 M Bordeaux.



# laŭtaj informoj

## POR EKFLUGO DE BALONOJ

(plu validas jena anonco)

La Ĝirondia grupo vendas ŝveligotajn balonojn kun surskribo "ESPERANTO Internacia lingvo", po 70 FF por 50 balonoj aŭ 130 FF por 100. Bv. mendi ĉe : Simonne BERNARD, 171 rue Raymond Poincaré F 33110 LE BOUSCAT

## MONDHEJMO

EKOLOGIA CENTRO INTERNACIA  
kun Esperanto kiel oficiala lingvo  
DUA RAPORTO EN 1987

Je la fino de februaro la 3 membroj de nia estraro veturis al Cauduro kun la intenco prepari la aĉeton de tereno por MH.

Nun ni ŝus finaranĝis tiun aĉeton, kies definitivan kontrakton ni subskribos venontan junion. Temas pri 3 apudaj duetaĝaj dometoj (teretaĝa surfaco entute iom pli ol 200 m<sup>2</sup>) en ruina stato kaj 3.000 m<sup>2</sup> da tereno, sur parto de kiu ni rajtas konstrui novan domon. Prezo entute : 20.000 FF. De la ruinoj ni provos konservi kiel eble plej da muroj, eble ĝis la alto de la teretaĝo.

Por disponi provizoran loĝeblon ĝis ni havos proprajn domojn, ni venis en akordon pri aranĝo kun instruista asocio (Freinet-pedagogio), kiu posedas grandan domon en Cauduro. Dum unu jaro niaj membroj rajtas uzi ties domon pagante la normalan tagan kotizon (ĝis nun 15 FF).

Pli detale povas informi vin la membroj de la estraro :  
prezidantino : Nicole PAIROUX, Rue Saint-Luc 35, B-5004 Namur  
sekretario : Akiles SANZ, Hafenplatz 6, Ap.206, D-1000 Berlin 61  
kasistino : Catherine SAMAIN, 9 av. de Verdun, F-60200 Compiègne

Sendepende de planitaj vojaĝoj dum 1987, la raportanto planas translokiĝi definitive al Cauduro en 1988.

Nia ĝisnuna kapitalo kune kun la kontribuo (15.000 FF) de tri gepruntedonintoj sufiĉas por pagi la kompletan prezon de niaj ruinoj kaj terenoj, sed tuj poste ni bezonos novan kapitalon por aĉeti konstrumaterialojn, planti arbojn ktp. Ĉi-rilate mi atentigas pri la alineo en nia nova informilo, kiu koncernas pruntedonojn.

Same gravaj kiel monaj kontribuadoj estas ankaŭ fakaj konsiloj

kaj manlaboro. La vilaĝo Cauduro disponas trinkakvon kaj kurenton. Daŭraj loĝantoj estas nur du maljunaj ŝafistoj sen ŝafoj.

Fine de marto Mondhejmo havas 48 membrojn el Belgio, Danlando, Francio, FR-Germanio, Hispanio kaj Kanado.

Akiles

## PARTOPRENU !

### De la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto

la Bordoza Junularo invitas vin en CREON (25 km. de Bordeaux) sud-okcidente de Francio, okaze de la jubilea jaro 1987.

Partoprenu en la 4-a Internacia Junulara Renkontiĝo de SAT-JF. Matene : DEBATOJ : Esperanto 100-jara! - pri Ekologio - pri Amnestio Internacia - pri la Pariza Komuno - pri Nikaragvo. Posttagmeze : EKSKURSOJ (piede, bicikle, aŭtobuse) al vin-produktanto, al St Emilion, al la Oceano...

Vespere : KULTURAJ ARANĜOJ - Vespere pri Raymond Schwartz (skeĉoj kaj diskuto kun Marie-Thérèse Lloancy pri ŝia diplomita tezo : E-o kaj vortludado en la verkaro de R. Schwartz - Klasika Horo - Internacia Folkloro - Kant-lud-trink-ctp-vespero...

Aliĝkotizo : 100 FF ĝis 15/07, 130 FF poste.

Restado : Por 3 manĝoj tage, 50 FF. Loĝado en amasloĝejo : 70 FF. En tendumejo : 40 FF. Nepre kunportu dormsakon!

Amuzaĵoj : Tuttaga ekskurso : 40 FF. Luado de biciklo : 140 FF. Partopreno en ĉiuj kulturaj aranĝoj kaj festoj : 115 FF.

Kalkulu mem la dolorigan sumon kaj sendu aliĝon al nia kasisto :

Gilles LAFITTE, Clairière des Aubiers, ent.7, apt 235, F 33300 BORDEAUX

N O M O.....Antaŭnomo.....Aĝo.....

Adreso.....

Kodo kaj URBO.....Lando.....

Mi pretas partopreni en la programo

partoprenante skeĉon de R.Schwartz

spektaklante dum la freneza E-vespero

tiel :

**JAM NOTU !** La Asocio Tarn-Esperanto aranĝos la SAT-Amikaran Kongreson de Pasko 1988 en Albi. La OKK konsistas el : Robert ARNAUDET (prezidanto), Ginette COSTES (sekretarino), Jean COSTES (kasisto).

Detalajn informojn vi trovos en venonta(j) numero(j) de

Laŭte!

## JUBILEA E-KONFERENCO, GRAZ 1987

**Lokigo de la jubilea monumento** : Estas decidite, ke la Jubilea E-Monumento "La Espero", skulptaĵo de Jesper Neergaard, trovos sian lokon sur la jam ekzistanta Esperanto-Placo en Graz. La urba administracio komplete nove aranĝos tiun placon (nova pavimo, plantado de arboj, translokigo de ĝenaj instalaĵoj) kaj metos la Monumenton en la centron. Ĉiuj laboroj estos pagitaj de la urbo mem. Entute la urbo Graz elspezos por la Monumento kaj la placo minimume duonan milionon da aŭstraj ŝilingoj. La solena inaŭguro de la Monumento okazos dimanĉon, la 19-an de julio je la 10-a horo en ĉeesto de la urbestro de Graz.

**El la programo de la Jubilea Konferenco** : Krom prelegoj pri la ĉefa temo : "100 Jaroj de Esperanto-Kulturo" laŭ diversaj aspektoj okazos ankaŭ **lingvokursoj** por progresantoj sub la kompetenta gvido de s-ino Maria Vitalyos el Ravensburg (F.R. Germanio)

La 20an de Junio 1986a, Pascal DUBOURG intervjuis s-ron Carlo SARANDREA, respondeculo de la Esperanto-dissendoj de

## RADIO VATIKANA

Ĉu vi povas rakonti al ni pri la historio de esperanto ĉe la radio Vatikana ?

*La E-programo de radio Vatikana komenciĝis en 1977, post multaj premoj far esperantistoj, kiuj skribis leterojn al la direktoro de R.V., petante programon en esperanto. Komence ĝi estis nur dekminuta vespera elsendo dimanĉe, poste daŭris la letersendado por pliampleksigi la E-fakon, kaj oni donis alian spacon ĵaŭde matene je la sepa. Kaj nun la programo havas tiun formon : ĵaŭde matene dekkvin minutoj kaj dimanĉe matene kaj vespere dek minutoj.*

Ĉu la redakcio esperanta estas cenzurata de Vatikano ?

*Ne, la respondeculoj mem verkas tekstojn, prenante el diversaj gazetkomunikoj, agentejaj novaĵoj kaj ankaŭ el intervjuoj. La enhavo de la tekstoj dependas de la aŭtoro. Kompreneble ni pritraktas la vivon de l'papo sed ankaŭ humanajn temojn kiel senarmiliĝon, paciĝon ktp.*

Ĉu vi ricevas multajn leterojn?

*Leterricevado malkreskis lastatempe pro altiĝo de sendkostoj. Tamen temas pri ĉ. 10 ĉiutage. Estas interese, ĉar venas leteroj ankaŭ el Sudameriko, kvankam ni ne havas specialan ondolongon por tiu regiono. Sed la plimulto venas el Eŭropo.*

Ĉu Radio Vatikana intencas plioftigi la E-programon?

*Dependas de la homoj, kompreneble. La stabanoj de RV deziras plivastigi la elsendotempon, sed la redakcio ne povas pro*

produktkialoj. Unue, ĉar la ondolongoj estas internaciskale dividitaj inter la stacioj kaj RV ne disponeblas sufiĉe. Due, la programo en esp. ne estas oficiala ĉe RV, ĝi estas nur gasto. RV donas spacon al esperanto sen tamen agnoski ĝin.

Pro tio vi estas sendependaj, ĉu?

Jes, tamen ni devas sekvi kelkajn neskribitajn regulojn.

Ekzemple pri la politiko de l'papo?

Ne, ne estas problemoj, ni estas liberaj ĉiusence. Ni mem donas al ni regulojn. En tiu senco ke ni preferas ne pritrakti movadajn aferojn. Esperanto estu lingvo kaj ni esprimu ion en esp. anstataŭ ol por esperanto. Ĝi estas lingvo kiel la aliaj.

Jes, pri la plioftigado de la elsendoj. La problemoj estas ke la ondolongoj de RV plenplenigas. Niaj vesperaj elsendoj estas tre ŝatataj, ĉar tiam ĉiu sendilo de RV estas ŝaltata. Sed jaŭde la horo estas stranga kaj ne ĉiuj sendiloj estas ŝaltataj.

Ĉu estas ripeto de la sama programo?

Ne, estas malsamaj. Dimanĉe vespere estas informoj, intervjuoj kaj religia penso. Jaŭde matene ni aldonas travivaĵojn, humanajn temojn, kaj ankaŭ jaŭde estas la rubriko pri la antaŭtaga aŭdienco de la papo. Mi ne scias, ĉu estontece oni povos plilongigi la programon, la plej grava problemoj estas nun akiri oficialan agnoskon de la instancoj. Kaj tio estas en bona paŝo.

Kial oni ne prezentas la novaĵojn en esperanto ĉe RV?

Bedaŭrinde oni devas pensi, ke en radio Vatikana agadas 33 lingvoj, tamen mankas lingvoj kiel la Swahili. Kaj oni preferas aldoni lingvojn ol pliampleksigi jam ekzistantajn. Kiam oni enkondukis esperanton, oni devis preni tempon de la germana programo. Tamen pliampleksiĝo eblas, sed oni devas ankaŭ ricevi grandan subtenon perletere kaj oni malpli skribas al ni ol pasinte.

Ĉu falas nur la statistikoj de la E-programo aŭ ankaŭ de la aliaj?

Ĉiuj. Estas ankaŭ redakcioj, kiuj tute ne ricevas leterojn, ekzemple la albana programo, sed tiam dependas de la politikaj problemoj.

---

Jenan leteron ni ricevis : "Mi havas peton por fari. Fakte, mi intencas akcepti eksterlandanojn, venontajn el Rumanio. Jam mi renkontis saman problemon, kiam, antaŭ du jaroj, mi intencis akcepti polinon, sed tio fiaskis pro malsaneco. Tamen, en tiu epoko, mi petis saman informon, vane. Estas pro tio, ke mi sendas tiun peton al diversaj asocioj, ĉar la problemoj estas gravegaj. Eble, pli impona nun, pro la granda rigardo de la ŝtato al la eksterlandanoj kiuj venas Francion. Kiam ni petas de la urbestro la permeson ricevi tiujn eksterlandanojn,

oni donas al ni flugfoliojn, sur kiun necesas skribi diversajn informojn kaj fine oni devas subskribi la **devontigon pagi ĉion pri malsaneco**. Tio ne eblas, eble malsano ne okazas ofte, sed imagi, kiam tio alvenas, la elspozo povas esti grandega. Mi pensas, ke multaj personoj ne timas kiel mi. Tamen, laŭ mi, ili eraras. Mi opinias, ke asekureco povas ekzisti. Mi ne ankoraŭ trovis ĝin. Necesas, ke mi solvu la problemon rapide. Tiuj personoj volas veni por du monatoj. Tre maljuna onklino de ili (96-jaraĝa) ne povas plu prizorgi pri tio. Mi povas akcepti ilin ĉe mi, mi povas garanti la manĝaĵojn kaj la ĉambron, ne la malsanecon. Mi atendas vian helpon, kaj multe dankas vin pro tio."

Adreso al kiu skribi vian sugeston : Thérèse SABATIER, 21 rue Pasteur, F 94490 ORMESSON. Tel. 45 76 10 57.

\*\*\*\*\*  
Nia asocio "Centre Esperanto de la Région Lyonnaise" (C.E.R.L.) organizis la seminarion de G.E.E. (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) en Lyon dum Pasko Dum tiu okazintaĵo estis prezentita la pedagogia eksperimento de Villefranche sur Saône kun VIDEO-KASEDO tre valora kaj en tre moderna prezento.

"La eksperimento ekzistas de 1984 kaj post sinsekva evoluo, ĝi atingas ĉi-jare 1986-87 tri nivelojn (6e-5--4e) dum lernotempo aranĝita interne de mezlernejestro kaj profesoroj. La kasedo montras bildojn de la eksperimento kaj la pretigon de eksterlanda vojaĝo dum junio (Pollando)."

La seminario decidis disvastigi ĝin pere de C.E.R.L.

La VIDEO-KASEDO (VHS-Sécam) daŭras 13 minutojn kaj estas je via dispono laŭ prezo : 200 + 20 (sendkosto) = 220 FF pagebla al C.E.R.L. - ccp 2444 99 H LYON. Nepre necesas ke ĉiuj federacioj, kluboj, izoluloj posedu ĝin por prezenti pere de ĝi la Internacian Lingvon.

Mendu rapide antaŭ la 10a de junio, por ke ni povu sendi la kasedojn antaŭ la ferioj.

Centre Esperanto de la Région Lyonnaise, 7 rue Major-Martin, F 69001 LYON  
\*\*\*\*\*

Gratulojn al amiko Joël LAPORTE, kiu sukcese trapasis la ekzamenon por akiri la Diplomon pri altaj esperantistaj studoj. Okaze de la enmanigo de la diplomo, sabate 6an de junio, estos aranĝita festa tago en la urbodomo de LE FLEIX, en departemento Dordonjo. Honorvino arigos urbestrojn, deputitojn lernejestrojn kaj... esperantistojn. En la programo : parolado, balo, ktp.

\*\*\*\*\*  
**Homarana Asocio** (Bismarckstr.28, D-3550 Marburg) ĵus eldonis :

"SURVOJE AL PONTOKULTURO", 36-paĝan broŝuron enhavantan materialojn por la kosmopolita humanismo (homaranismo) : Homaranismo hodiaŭ ; Marburga Manifesto ; Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj ; Deklaracio pri Homaranismo 1913 ; La Espero ; Preĝo sub la Verda Standardo.

"...Ne lasu vin trompi... de iuj statutoj aŭ oficialaj deklaroj, sed rigardu la psikan realecon en esperantujo. Kaj jen montriĝas, ke por la plimulto de la esp-istoj, spite al ĉiuj deklaroj, Esperanto estas pli ol lingvo..." (ekstrakto el la Marburga Manifesto). Nepre rekomendinda!

## KRUCVORTENIGMO


### HORIZONTALE :

1. - Multipliki. 2. - Malamuziĝas. - En la proksimeco de. 3. - La atmosfero estas malofte tia. - Tiu de urso ne estas vendebla antaŭ la mortigo de la besto. 4. - Prefikso de landeto, kies devizo estas "Kune ni aspiras, kune ni atingas". - Eŭropa vadbirdo (s.f.). 5. - Reveno. - Estas malkonsilinde tion fari en malklara akvo. 6. - Fajri, flami. - Dimensio (s.f.). 7. - Ĵus dirita al la startanto. - Verba sufikso. 8. - Ĝi estas forta kiel la morto. - ... du estas dekse. 9. - Kia estas fonto de infraruĝaj radioj. - Teknika sufikso karakterizanta fizikajn grandojn en elektroscienco. 10. - Prenos kiel rime-don por atingi celon. - Egalpotenciala surfaco. 11. - Heredantojn.

### VERTIKALE :

1. - Li ludas meze de la atakanta linio (s.f.). 2. - Unu- aŭ plurjara herbo, kies nomo estas france : azena herbo, angle : vespera primolo kaj germane: nokta kandelo aŭ sorĉistina herbo (s.f.). - Nek supere, nek malsupere. 3. - neniu, nenio alia, ol ... - Homo, kiu okupiĝas nur pri revaĵoj (s.f.). 4. - Arbedo, ornamplanto, kiu kreskas sur la sablo de la marbordoj (s.f.). - Sur usona aŭtomobilo cirkulanta eksterlande. 5. - Japana industria haven-urbo. - Adverbo montranta malgrandan kvanton. 6. - Rezervita al incitoj. 7. - Sur la deklivo de vulkano. - Verba sufikso. 8. - Ĝi odoras je mustardo sed bedaŭrinde ne estas spicaĵo (s.f.). 9. - Hungara supo (s.f.). - Deciduaj arboj, kies reĝo rolas en fama balado de Goeto. 10. - Paganismon.

Solvo de la enigmo de L! 71



**Hor.:** 1.CENTJARIĜO. 2. ILEI. KEDIV. 3. GALONULO. 4. AĈA. AZALEO. 5. RECITJOJ. 6. ETATA. SBIR. 7. DA. ALPORTI. 8. IDILIO. UEK. 9. NOD. TRISTA. 10. EKATAK. 11. OPORTUNECO.

**Ver.:** 1.CIGARETINGO. 2. ELAĈET-ADO. 3. NELACA. IDEO. 4. TIO. ITAL. KR. 5. NATALITAT. 6. AKUZO. PORTU. 7. RELAJSO. IAN. 8. IDOL. BRUSKE. 9. ĜI. EPITET. 10. OVIO. RIKANO.

**Sfinksido**  
(C. Cavalie)

\*\*\*\*\*  
la venonta numero (+ adresaro) aperos meze de septembro  
\*\*\*\*\*